

EL POPOLA ĈINIO

中國報通

9

1998

ISSN 0032 - 4361



Pri ĉinaj homoj

For la kaŝemo!

**Kiam vi bezonas urgan helpon en
Ĉinio...**



Arbofolioj

Foto de WU GUANGTIAN

INTER NI

De ĉi tiu numero ni havas novan rubrikon “Vestoj de ĉinaj nacioj”. Vestoj estas marko kaj aspekto de nacio, kaj samtempe spegulo de ĝiaj socio, historio kaj kulturo. Ĉinio havas longan historion kaj multajn naciojn. Iliaj buntaj vestoj dancas antaŭ niaj okuloj. Estas malfacile distingi inter vestoj de nacioj, iam eĉ okazas miskompreno. Iu alilanda turisto deziris rigardi ĉinon en robo, kun longa harplektaĵo. Fakte tio estas tipa aspekto de ĉina viro en Qing-dinastio (1644-1911). Do la ĉiĉerono gvidis lin spekti teatraĵon kun roloj de antikvaj ĉinoj en robo kaj kun longa harplektaĵo. Ankaŭ la ĉiĉerono neniam vidis homon en tia vesto en la ĉiutaga vivo. Tia vesto fariĝis paĝo de historia libro. Ni esperas, ke la rubriko helpas niajn legantojn koni la reprezentajn vestojn de diversaj ĉinaj nacioj.


Ni prezentas al vi ankaŭ aliajn artikolojn. “Pri ĉinaj nomoj” konigas la nomojn de

ĉinoj, kiuj konsistas ĉefe el po du-tri ideogramoj. La nomoj ŝajne ne estas komplikaj, tamen iliaj historiaj ŝanĝiĝoj kaj tradiciaj principoj estas fremdaj ankaŭ por iuj ĉinoj. “Ĉinio penadas por historia datado” rakontas arkeologian esploradon por konigi la precizan tempon de la fondiĝo de la unuaj tri dinastioj de Ĉinio. Ĉinio havas historion sufiĉe longan kun notoj en libroj, kaj ankaŭ tre longan sen skribaĵo. La esplorado helpas precize dati la dinastiojn. Ni kredas, ke dank’ al tio la historia fakto fariĝos klara. En la rubriko “Por komencantoj” vi ĝuos tataran fabelon “Tri filinoj”, mallongan, tamen signifoplenan. En la rubriko “Originale verkitaĵ” ni prezentas tri belajn poemojn, sed bedaŭrinde ni havas foton de nur unu aŭtoro. Ni petas, ke la kontribuontoj sendu al ni ankaŭ sian foton.

La Red.

El Popola Ĉinio

9 [480] 1998



Flugigo de kajtoj

Foto de Liu Chungen

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P. O. Kesto 77,

Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:


+86-10-6832 1808

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/elpopolacxinio>>

ENHAYO

- | | | |
|----|--|--|
| 2 | INTER NI | Ankaŭ tie estas vidindaĵoj |
| 4 | Mia vizito al Ningxia | 28 EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 6 | EKONOMIE: | 29 VESTOJ DE ĈINAJ NACIOJ: |
| | Entreprenejoj pri medioprotekto; | Vestoj de tibet-naciaj kangba-oj |
| | Kurantaj aferoj | 32 Tabuoj en la ĉina lingvo |
| 7 | Esperanto-ekspozicio en Schwelm | 34 Disvolvi marajn produktojn |
| 8 | Makao: baldaŭ hejmen | 36 Heroo de provflugigo de aviadilo |
| 10 | Malbone konata pasio: bredado de kaĝaj kaj flugejaj birdoj | 38 Montgrimpado de antaŭaj paralizitoj |
| 11 | ORIGINALE VERKITAJ: | 40 ĈINA KULTURO: |
| | Tri poemoj | La ĉielo en la okuloj de antikvaj ĉinoj (II) |
| 12 | POR KOMENCANTOJ: | 42 TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ: |
| | Tri filinoj (Tatara fabelo) | Pri ĉinaj nomoj |
| 13 | ESP-NOVAĴOJ | 44 ORDINARAJ ĈINOJ: |
| 14 | Kiam vi bezonas urĝan helpon en Ĉinio... | Lertaj metiistoj de <i>huĉin-o</i> |
| 16 | JUNULARO: | 46 Ĉinio penadas por historia datado |
| | Junaj volontuloj servas en la kamparo | 48 "El Popola Ĉinio" eliras de ĉi tie |
| 18 | Donaco por la infanoj | 50 POR VIA SANO: |
| 20 | For la kaŝemo! | Sanprotekto en aŭtuno |
| 21 | NUNTEMPA BELARTO: | 51 ĈINAJ METIARTAĴOJ: |
| | Desegnitaj homaj vizaĝoj en pekina opero | Bambua plektajo |
| 24 | EN ĈINAJ URBETOJ: | 2 Arbofolioj |
| | | SUR LA DORSKOVRILO: |
| | | [FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ] |
| | | Rememoro; Aŭstria pejzaĝo |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|---------------------|------------------|
| 1. Ningxia (p. 4) | 4. Panyu (p. 28) |
| 2. Makao (p. 8) | 5. Garze (p. 29) |
| 3. Xingping (p. 24) | |

Mia vizito al Ningxia

LA mongola kavalerio iam arogante galopis tra la Eŭrop-Azia Kontinento, kaj imponis ĝia reganto Ĝingis-Ĥano (1162-1227). Tamen li ne atendis, ke li falos en batalo kontraŭ la regno Okcidenta Xia (1038-1227). La mongola kavalerio renkontis obstinan rezistadon. Laŭdire, antaŭ sia morto li ordonis detruigi la tombejojn de la estroj de la regno, ĉar li pensis, ke ĝuste tiu peco da tero kulturis sian bravan popolon.

700 jaroj pasis. Pro la ekspedicio de Ĝingis-Ĥano ne troveblas la antikva Dangŝjang-nacio, kiu vivis en Okcidenta Xia. Malaperis ankaŭ la regno. Tien venis araboj kaj persoj, kiuj kredas je islamismo. Tio estas Ningxia, la plej granda huj-a loĝloko en Ĉinio. En 1958 ĝi iĝis unu el la kvin naciminoritataj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio — Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono.

Ningxia signifas “pacigi Okcidentan Xia”. Ĝi en nordokcidenta Ĉinio arebas 66.4 milojn da kvadrataj kilometroj kaj havas 5.3 milionojn da loĝantoj. La popoldiro “la Flava Rivero riĉigas Ningxia” montras la veron — ĉiujare en majo kaj junio la Flava Rivero akvumas la mezan kaj nordan partojn de Ningxia, kie do videblas verdaj rizkampoj; sed la sudan montregionon ne trafluas la rivero kaj tie la grenplantoj dependas nur de pluvo. Tiel en la suda regiono multaj kamparanoj fosis akvorezerve-

jon, kiu eĉ fariĝis kriterio de riĉeco de la familio. Antaŭe, la gepatroj de la fianĉino nepre demandis pri la fianĉa familio antaŭ ol decidi edzinigon: “Kiom da akvorezervejoj la familio havas?”

NOVTIPA VILAĜO

Rapide disvolviĝas la ekonomio en orientaj ĉemaraj regionoj de Ĉinio. La registaro ellaboris novan politikon por disvolvo de ekonomio en okcidenta Ĉinio. Tio donas favoron al la suda montregiono de Ningxia. Huaxi-vilaĝo de Jiangsu-provinco estas tre riĉa. En 1995 ĝi decidis helpi kamparanojn en suda Ningxia. Ĝi ne simple donacis monon, sed konstruis novan vilaĝon sur 1 300 hektaroj da dezerta tero en Zhenbeipu en antaŭurbo de Yinchuan, ĉefurbo de Ningxia. Ĝi ankaŭ sendis spertajn administrantojn helpi lokajn gvidantojn. Ĝi deziras, ke montanoj transloĝiĝu en la novan vilaĝon kaj vivu el sia diligenta laboro sed ne plu el subvencio de la ŝtato.

Huaxi-vilaĝo sukcesis pro siaj vilaĝaj entreprenoj. Antaŭ 3 jaroj Guo Zhenjia, montvilaĝano en suda Ningxia, neniel pensis, ke li havos rilaton kun Huaxi. Li ne estas tre kuraĝa, tamen li kredas la gvidantojn, kiuj konsilis al li transloĝiĝi al la nova vilaĝo. “Kial ne?” tiam li pensis.

En lia nova domo mi vidis preskaŭ ĉian posedaĵon por ordinara ĉina familio: tabloj, seĝoj,

sofoj, vestoŝranko, novtipa televidilo kaj eĉ telefono. Li diris al mi, ke tiumonate li pagis 80 juanojn por telefonado, tia sumo estas sufiĉe granda eĉ por telefonado de familio en Pekino. Ĉiujare li enspezas preskaŭ 10 000 juanojn, kaj antaŭe nur kelkcent. La granda ŝanĝiĝo estas kvazaŭ songo por li. De tempo al tempo li invitas siajn parencojn, kiuj ankoraŭ loĝas en la monto. Ili tre envidas la novan domon de lia novedziĝinta filo. Guo estis unu el tiuj, kiuj la unuaj ekspluatistoj 400 hektarojn el la 1 300 hektaroj da dezerta tero por kulturi grenon, kaj ili ricevis favoron: senimposta kulturado en la unuaj tri jaroj kaj mondonaco de la registaro por konstrui loĝdomon. Ĝis nun al la nova vilaĝo venis 1 000 familioj kun 6 000 homoj el la malriĉa regiono. Laŭ la aspekto de la domoj oni povas vidi, kiom longe la mastro vivis tie. Etendiĝas la kanalo por konduki akvon el la Flava Rivero, kaj plimultiĝos tiaj vilaĝanoj, kia Guo Zhenjia.


PROSPERA BAZARO

Geografie Ningxia estas ferma, tamen eble dank’ al la spertaj huj-aj komercistoj, tie aperis kelkaj distribuaj centroj de varoj. En Tongxin-gubernio en malriĉa suda regiono, 80% de la loĝantoj estas huj-oj. De la lastaj jaroj ili komercas per nostokoj. Iliaj nostokoj bone vendiĝas en suda Ĉinio, precipe en Guang-

dong-provinco. Fakte nostoko ne multe troviĝas en Tongxin, tamen la huj-oj kolektas ĝin ĉe la najbaraj lokoj kaj formis en Tongxin grandan merkaton. Tial multaj Guangdong-aj komercistoj bone konas Tongxin, sed eble ne scias, kie estas la ĉefurbo de Ningxia.

Estas ankaŭ prosperaj bazaroj en Ningxia, ekz. tiu de licio en Zhongning, tiu de ligno kaj glicirizo en Wuzhong kaj tiu de felo en Zhongwei. Interese, en la bazaroj ne aŭdiĝas voĉo de marĉandantoj. En Jiugongli de Wuzhong mi vizitis bazaron, kie oni komercas nur per gestoj similaj al tiuj de makleristoj en akcia borso, la aliaj tute ne komprenas tion. Ili-aj gestoj estas nevideblaj — ili premas manon unu al la alia sub basko aŭ en manumo. Ĉiu devas fari la “manan interkonsenton”. Tio estas antikva kaj tre interesa maniero. La sumon de imposto decidas respektata maljunulo, kiu konservas karakteron de antikvaj kapabluloj. Multaj el tiuj komercistoj kulturata teron kaj bredas brutojn, kaj en libera tempo ili venas al la bazaro.

Marĉando per gestoj



La familio de Guo Zhenjia

PLI BELA ESTONTECO

La Flava Rivero favoras Ningxia, kiun enigas la provincoj, kie mankas akvo. Tamen pro la geografia situo Ningxia de antikve estas regiono de agrikulturo kaj brutobredado. Kompare kun la ĉemaraj regionoj, ĝia industria ekonomio ne estas prospera. Mao Rubai, nova estro de la Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono, estas tamen tre optimisma. Li diris al ni: “La ekonomio de Ningxia kreskos je 10%.” Verŝajne li eĉ estas iom singarda, kial do li tiel fidigas la estontecon?

Ni rigardu laboron de Ningxia-anoj en la pasintaj 40 jaroj: la konstruo ĉerpi akvon de la Flava Rivero per multaj pumpiloj ekfunkcias ankaŭ en la suda regiono; oni uzas elektron eĉ en malriĉaj montvilaĝoj; telekomunikaj instalaĵoj funkcias ĉie en Ningxia; la sukcesa transformado de dezerto en Shapotou estas tre utila por konstruado de ŝoseo en dezerto de Xinjiang — dezerto estas anstataŭata de verdejo, tiuj

pecoj de dezerto eĉ iĝis turisma loko; en la eksperimenta kampo oni aplikas avangardan teknikon: poguta kaj ŝpruca irigacio; nova elektrizita fervojo kaj konstruita aŭtovojo interkomunikigos Ningxia kaj la ĉemarajn regionojn... Facila trafiko, sufiĉa elektrolivero, multa rezervokvanto de karbo, petrolo kaj natura gaso, nemultekosta laborforto, ĉio ĉi estas tre grava por la industria disvolviĝo. Ĝuste pro tio Mao Rubai invitas nin reviziti Ningxia post kvin jaroj, ĉar li kredas, ke Ningxia faros miraklon. ■

Kunlaboro petata

La Hangzhou-a Komerca Kompanio “Esperanto-Mar” volas kunlabori kun ĉiuj E-organizo kaj esperantistoj pri komerca traktado, varo-perado, poŝta aĉetado kaj interŝanĝo de varoj.

Adreso: Direktoro Qiu Xirong, Jiefang Lu 24, CN-310009 Hangzhou, Zhejiang, Ĉinio

Telefono: +86-571-7071705

Telefakso: +86-571-7035995

Entrepreneoj pri medioprotekto

de JI PING

LAŭ nekompleta statistiko, en Ĉinio estas 9 000 entreprenoj kaj institucioj pri medioprotekto kun du milionoj da laborantoj.

Ili liveras ĉefe instalaĵojn kontraŭ polucio de aero kaj akvo, kiaj senpolvigilo, apartigilo, antiseptilo kaj biologia traktilo por rebonigi la poluitan akvon. La instalaĵoj preskaŭ sufiĉas por trakti industriajn kaj ĉiutage uzitan akvon. Krome, produktiĝas ankaŭ instalaĵoj por trakti solidan eluzaĵon, por redukti bruon kaj skuadon, por kontroli poluciadon, kaj materialoj medioprotektaj. Tiaj entreprenoj situas ĉefe en urboj ĉemaraj, ĉe Yangzi-rivero kaj en la tri provincoj en nord-orienta Ĉinio. La plej granda ĉina merkato pri medioprotekta tekniko situas en Yixing de Jiangsu-provinco.

Laŭ raportoj de koncernaj internaciaj organizaĵoj kaj ĉinaj medioprotektaj institucioj, en Ĉinio troviĝas 10 el la 20 urboj, kies aero estas plej grave poluita en la tuta mondo; acida pluvo aperas en pli multaj ĉinaj regionoj; akvo-polucio kaj bruoj estas seriozaj. Ĉiujare, Ĉinio rekte perdas 95 miliardojn da juanoj pro la polucio, kaj nerekte perdas pli multe (8.3 juanoj = 1 usona dolaro).

Konsciante tion, por ĉerpi la lecionon de iuj landoj "traktado post polucio", la ĉina registaro prenas medioprotekton kiel sian bazan ŝtatan politikon, ellaboris strategion de kontinua disvolvigo kaj planojn pri medioprotekto, kiaj "Ĉina programo por la 21-a jarcento", "La 9-a Kvin-jara Plano de la ŝtato kaj ĝia celo en 2010 por medioprotekto", kiuj difinas



Propagando por protekto de medio kontraŭ polucio de vostgaso de aŭtoj

la celon trakti polucion en la venontaj dekelkaj jaroj. Tio donas vastan merkaton al la medioprotektaj entreprenoj. Samtempe, koncerna instanco starigis leĝojn por redukti polucion de iuj entreprenoj kaj transformas aŭ fermas la fabrikojn poluciantajn.

En la lastaj jaroj la ĉina registaro pli multe financis medioprotektadon. En 1996-2000 la sumo estos 450 miliardoj da juanoj. La financoj, la novaj instalaĵoj por medioprotekto kaj la granda bezono pri tiaj instalaĵoj, ĉio ĉi puŝas la merkaton al disvolvigo.

En Ĉinio oni ne nur traktas bruon kaj polucion de aero kaj akvo, sed ankaŭ klopodas utiligi novajn energiojn, kiaj la suna, venta kaj nuklea, kaj disvolvi novajn hejmajn aparatojn, kiuj bezonas malmulte da elektro kaj malmulte bruas. En Ĉinio iuj fa-

brikoj produktas fridujojn sen freono, pakumojn el apartigebla plasto, farbojn kaj dekoraciajn materialojn senpoluciajn, insekticidon el plantoj kun malmulte da veneno... kamparanoj liveras senpoluciajn agrikulturajn produktaĵojn. Ĉio ĉi harmonias kun la tendenco "reveni al la naturo".

Pro multiĝo de aŭtomobiloj la aero estas grave poluciita. Oni tre atentis tion. Ĝis la fino de 1997, en Ĉinio konstruiĝis 66 stacioj, kiuj liveras naturan gason kiel brulaĵon al 7 500 aŭtoj. Antaŭ la fino de la jarcento, en Ĉinio aperos 50 000 aŭtoj kun gaso likvigita kiel brulaĵo. Kompare kun la benzina, la gasa motoro malmulte polucias.

Oni vidas, ke medioprotektaj entreprenoj ludas gravan rolon por la disvolvigo de la ĉina ekonomio. ■

Kurantaj aferoj

● La 1-an de majo ekfunkciis la provizora kluzo, unua sinteza programo de la Projekto de Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero. Tio estas nova atingo post digado de Yangzi-rivero.

La kluzo taŭgas por 3 000-tonela ŝiparo, kun avangarda hidraŭlika sistemo por fermo kaj malfermo. Ĝenerale, ŝipo povas transiri ĝin en 45 minutoj. En 2003 ekfunkcios la oficiala kluzo.

● En Qaidam-baseno en nord-okcidenta Ĉinio geologiaj esploristoj trovis dikan tavolon de petrolo kun areo de ĉ. 23 000 kvadrataj kilometroj, inter kiuj 6 000 dikas pli ol 1 000 metrojn kaj 13 600 dikas pli ol 800 metrojn. Tio prezentis bonan perspektivon al la petrolindustrio de Ĉinio.

● La nuklea elektrejo Lian-

yungang ĉe la Flava Maro, la plej granda en Ĉinio, estas konstruata. Ĝi estas la plej granda projekto en kunlaboro de Ĉinio kaj Rusio. Oni konstruos ĝin en tri periodoj. Post la unua periodo ĝi liveros 15 miliardojn da kWh da elektro ĉiujare, kio favoros orientan Ĉinion.

● Startis la plej granda eksporta programo de Ĉinio — konstruado de metroo en Teherano, ĉefurbo de Irano. La kontrakto kun valoro de 550 milionoj da usonaj dolaroj enhavas konstruadon de du subteraj fervojoj kaj unu elektrizita fervojo en antaŭurbo de Teherano.

● Senpilota aviadilo por teokontrolo ekfunkciis lastatempe en Ĉinio. Ĝi pezas 12 kg kaj povas porti 3 kg. La tuta sistemo konsistas el la aviadilo, cifera ĉiel-

esplorilo kaj surtera ricev- kaj trakt-sistemo. Antaŭe estis uzata termobalono, per kiu oni esploris nur unu punkton. La senpilota aviadilo havas flugan radiuson de 300 km kaj povas flugi 4-8 horojn unu-foje.

● En la ĉina kamparo estas 46 000 malgrandaj hidroelektrejoj, kiuj produktas 73 miliardojn da kWh da elektro, t.e. 40% de la elektra produktokvanto de la malgrandaj hidroelektrejoj en la mondo.

Laŭ statistiko de UN, en la mondo 2 miliardoj da homoj ne povas uzi elektron, kaj plejparto el ili loĝas en foraj montregionoj de evoluantaj landoj. Ili loĝas dise en topografie komplikaj regionoj, kie granda elektra reto ne taŭgas, kaj malgranda hidroelektrejo ludas pli kaj pli gravan rolon.

Esperanto-ekspozicio en Schwelm

La Esperanto-grupo de Schwelm, Germanio, ekzistas jam 50 jarojn. S-ro Heinz Schindler partoprenis en ĝia unua Esperanto-kurso de marto ĝis decembro 1948. La 8-an fojon li havis Esperanto-ekspozicion en 3 vitrinoj en la enirhalo de la distriktadministracio en Schwelm.

La unua vitrino enhavas Esperanto-gazetojn, ankaŭ EPĈ, kaj dokumentojn el la historio de tiu Esperanto-grupo, ekzemple lian membrokarton de la Schwelma E-grupo de 1948, kongresan libron de la IFEF-kongreso 1962 en Budapeŝto, kie tiam partoprenis pli ol 1 000 fervojistoj, raportojn el Schwelmaj gazetoj pri la UK 1963 en Sofio kaj 1965 en Tokio kaj raporton en Heroldo pri la inaŭguro de la Esperanto-vojo apud la Zamenhofvojo en Schwelm.

La dua vitrino enhavas Esperanto-prospektojn de Köln, Frankfurt kaj Korea, Esperanto-poŝtmarkojn kaj leterojn kun tiaj poŝtmarkoj, Esperanto-monerojn el Kroatio, jarlibron de UEA, la Esperanto-gramatikon kaj la libron pri 1 044 Zamenhof- kaj Esperanto-ob-

jektoj en 54 landoj, en kiu ankaŭ estas foto de la fama stratkruciĝo de Zamenhofvojo kaj Esperantovojo en Schwelm.

La tria vitrino estas dediĉita al la 20-jara amikeco kun ĉinaj e-istoj. En ĝi estas ekzempleroj de EPĈ kun liaj raportoj el la jaroj 1980 (n-ro 1/81) kaj 1984, kolĉeno el perloj kaj ligna artaĵo kiel donacoj de ĉinaj Esperanto-geamikoj, bela informprospekto de la bierfarejo en Qingdao, kiun li povis viziti dank' al tiea e-isto, flageto kaj programo de Radio Pekino, mapo de Ĉinio en Esperanto, la kongresa libro de la 1-a Azia Kongreso de Esperanto, belaj novjaraj kartoj 1998 de EPĈ, Wang Jingrong kaj Wang Xue, artikoloj el Schwelmaj gazetoj pri lia vizito de la Azia Kongreso en Ŝanhajo kaj la invitilo al la bankedo ĉe la prezidanto de la popolkongreso en Ŝanhajo kun la manĝokarto. En la gazetraporto malsupre estas videbla foto kun li, Wang Xue, Tan Xiuzhu, Lee Chong-Yeong kaj grupano el Suzhou. La Esperanto-ekspozicio daŭris de marto ĝis junio 1998.



Makao: baldaŭ hejmen

LA 1-an de julio lastjare Hongkong revenis en la sinon de Ĉinio. Tiuokaze la ĉinoj kompreneble pensis pri Makao (Aomen), kiu havas similan travivaĵon kiel Hongkong. Ili esperas, ke ankaŭ ĝi frue revenos. Maje de la kurenta jaro, oni starigis horloĝon por retrokalkuli la tempon pri la reveno de Makao en la orienta flanko de Tian'anmen-placo, kie antaŭe oni faris la samon por la reveno de Hongkong. Oni konsciis, ke nelonge poste revenos Makao. La 5-an de la pasinta majo en Pekino fondiĝis la prepara komitato por fondo de la Speciala Administra Distrikto de Makao.

Makao konsistas el la Makaa Duoninsulo, Taipa-insulo kaj Coloane-insulo. Ĝi situas ĉe la okcidenta bordo de Perlo-rivero de suda Ĉinio, najbaras al la

Zhuhai-a Speciala Ekonomia Distrikto de Guangdong-provinco kaj distancas 60 km for de Hongkong en oriento. Pro longjara ŝlimado kaj grandskala transformado de maro en kampojn, Makao grandiĝis kaj nun areas 20.8 kvadratajn kilometrojn, apenaŭ kvindekono de la areo de Hongkong. Inter la ĉ. 500 mil loĝantoj plejparto estas ĉinoj, krome estas ankaŭ portugaloj k.a. En la Makaa Duoninsulo koncentriĝis 90% de la loĝantoj kaj plejparto da industria kaj komercaj entreprenoj.

Makao haveniĝis en 1535. Tamen 5 000 jarojn antaŭe tie jam vivis prauloj de ĉinoj. Samkiel Hongkong, de antikve Makao estas nedisigebla parto de la ĉina teritorio.

Meze de la 16-a jarcento, sub la ŝildo "marnaviga malkovro"

de la eŭropa koloniismo, portugaloj atingis sudorientajn ĉemarajn lokojn de Ĉinio. En 1553, kun preteksto "prunti lokon por sunumi malsekiĝintajn varojn", la portugaloj ricevis la permeson portempe loĝi sur la Makaa Duoninsulo, tiel rapide formiĝis portugala vilaĝoj. Tamen de tiam ĝis la Opia Milito (1840-1842), la duoninsulo estis administrata de la ĉina registaro.

Post la Opia Milito pli kaj pli dekadenciĝis la registaro de Qing-dinastio. Tiuokaze la portugala koloniistoj fermis en 1848 la doganon starigitan de la registaro de Qing-dinastio kaj forpelis la ĉinajn ŝtatoficistojn. Per okupado de Taipa-insulo kaj Coloane-insulo respektive en 1851 kaj en 1864 la portugaloj efektivigis sian okupadon de la tuta Makao. En 1887 la registaro de Portugalio devigis la

registaron de Qing-dinastio subskribi la neegalan "Pekinan Traktaton inter Portugalio kaj Ĉinio", tiel legaliziĝis la kolonia regado de Portugalio super Makao.

En la pasintaj jaroj la ĉinoj, inkl. la Maka-anojn, neniam forgesis, ke Makao estas teritorio de Ĉinio, kaj penadis por revenigi ĝin. Tamen pro la malforteco kaj malriĉeco la malnova Ĉinio ne solvis la problemon pri Makao. Post la fondiĝo de la popola respubliko en 1949 la ĉina registaro multfoje deklaris, ke ĝi ne agnoskas la neegalajn traktatojn altruditajn de koloniistoj al Ĉinio, kaj ĝi esperis interkonsiliĝi kun la portugala registaro por solvi la problemon pri Makao. Ne kiel ĉe la problemo pri Hongkong, tiam oni ne menciis daton por redoni Makaon. Malgraŭ tio, la ĉina registaro senĉese penadis.

La 13-an de aprilo 1987, la penado rikoltis fruktojn. Post amika interkonsiliĝo en Pekino la registaroj de Portugalio kaj Ĉinio oficiale subskribis la "Komunan Deklaracion de Ĉinio kaj Portugalio pri Makao". La deklaracio diras, ke Ĉinio restarigos sian suverenecon super Makao en la 20-a de decembro 1999, kaj la politikaj promesoj solvi la problemon pri Hongkong validas ankaŭ por Makao, t.e. stariĝo de la Speciala Administra Distrikto de Makao kaj praktiko de la politikoj "unu lando, du sistemoj", "Makao sub regado de Maka-anoj" kaj "alta aŭtonomeco en Makao".

Poste la du regis-

taroj daŭre faris fruktodonan kunlaboron. La 31-an de marto 1993, la 1-a Sesio de la 8-a Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio diskutis kaj aprobis la "Fundamentan Leĝon de la Speciala Administra Distrikto de Makao", kaj tiel starigis leĝan bazon por solvi la problemon pri Makao.

La fundamenta leĝo difinas: La Speciala Administra Distrikto de Makao ĝuos rajtojn de administrado, leĝdono, sendependa jurisdikcio kaj finjuĝo; la administra kaj leĝdona instancoj konsistos el konstantaj loĝantoj de la distrikto; la distrikto ne praktikos la socialismajn sistemon kaj politikon, kaj konservos la kapitalismajn sistemon kaj vivmanieron por 50 jaroj; la distrikto laŭleĝe protektos la privatajn posedaĵojn; la distrikto povos pendigi sian flagon kaj uzos sian emblem-on; la distrikto povos laŭ la fundamenta leĝo ellabori politikojn pri ekonomio, komerco, financo, navigacio, edukado, kulturo, sporto, scienco kaj tekniko;

la distrikto povos ankaŭ en la nomo "Makao de Ĉinio" konservi kaj evoluigi rilatojn kun koncernaj organizoj de ĉiuj landoj kaj regionoj de la mondo, subskribi kaj plenumi interkonsentojn, aliĝi al koncernaj internaciaj organizoj kaj partopreni koncernajn internaciajn konferencojn.

La Komuna Deklaracio kaj la Fundamenta Leĝo de Makao enhave estas preskaŭ samaj kiel la dokumentoj pri Hongkong, interalie parto estas pli avantaĝa kaj perfekta dank' al la sperto de Hongkong.

Malgraŭ tio, oni devas scii, ke "unu lando, du sistemoj" estas nova ideo, pri kiu oni ne havas sperton. Precipe ĉe Makao troviĝas specifaj problemoj solvendaj. Ekz., enoficigo de lokaj ŝtatoficistoj, oficialigo de la ĉina lingvo kaj ellaborado de leĝo kun regionaj ecoj, ĉio ĉi atendas pli grandan klopodon de koncernaj departementoj.

Tamen la ĉinoj kredas, ke Makao glate revenos al la sino de la patrujo. ■

Strato de Makao



Malbone konata pasio: bredado de kaĝaj kaj flugejaj birdoj

Kiuj ni estas?

En Francio ni estas pli ol 50 000 pasiuloj grupiĝintaj en kluboj kaj federacioj. Kiam, ĉiun jaron, malaperas pluraj bestospecioj pro la homa stulteco, ni klopodas konservi bredan ornitologian bestaron. Tial, pluraj birdospecioj estas nun pli multnombraj en la kaĝegoj de birdamantoj ol en sia natura biotopo. Mi nur citas la plej konatan ruĝfruntan kakarikon de Novzelando. Tiele, ombre, laŭ nia nivelo, ni partoprenas je la protektado de la monda ornitologia hereda posedaĵo.

Hobio ne tia kiel alia

Neniu amatora bredisto diros al vi, ke li ricevas profiton el sia birdaro, pro simpla kialo: Tiuj karaj gastoj ofte loĝas en luksaj flugejoj kaj disponas pri altkvalita nutraĵo, por esti kiel eble plej feliĉaj, kio instigos ilin al reproduktado. Ĉu tio ne estas la celo de la amatora bredisto? Sen kalkuli, li investadas, foje, malfavore al sia propra familio. Sed, kia feliĉo estas vivi inter birdoj, tiuj mirindaĵoj de la tera paradizo.

Kiuj estas en niaj flugejoj?

Unue, oni povas mencii kanarion — tre simpla bredado — birdon kiu kunportas sunradion dank' al sia aparte melodika kanto.

Ni daŭrigos pri familio de psitakedoj: papagetoj, kiuj, aŭ etaj aŭ pli grandaj, ĉiam allogas niajn okulojn per la diverseco de la ŝanĝbrilaj koloroj.

Poste, ni daŭrigos pri birdo, kiu ĉiam pasiigas la tutan mondon: la papago. Dank' al sia ebleco imiti la homan voĉon kaj multajn aliajn, ĝi estas unu el la birdoj plej ŝatindaj. Por fini, mi ne forgesos paroli pri ĉiuj etaj paseroj aŭ "astrildoj", kiuj devenas el Afriko, Azio kaj Sud-Ameriko; ili estas la ĝojo kaj la gajeco de niaj flugejoj, kie ili

sin reproduktas kun granda facileco.

Malforta kaj delikata specio

Koncerne min, mi dediĉis mian tempon al la esplorado pri birdoj tre specifaj: la nektar-manĝantoj, birdoj, kiuj nutras sin per nur floraj nektaroj, ankaŭ per etaj insektoj. Oni nomas ilin kolibroj aŭ muŝbirdoj.

Simpligita prezentado de la kolibro

Mi emas diri ke la kolibro estas fluganta motoro ĉar, se al la birdo mankas nektaro dum unu horo venas la morto, kiel motoro kiu haltas. Oni trovos diversajn nektarojn en komercejo, ĉiujn bone preparitajn por la nutrado de tiuj birdoj. Por perfekta nutrado kaj ĉefe kiel manĝaĵo por junaj birdidoj, oni ne forgesu doni al ili drozofilojn, muŝetojn, kiuj disvolviĝas dank' al fruktofermentado je temperaturo super 18 gradoj.

Kolibro bezonas nutradon dum minimume 12 horoj tage. Necesas aranĝi lumigan sistemon por la vintraj monatoj, kiam taglumo estas tre mallonga.

Loĝejo

Se oni deziras, ke kolibroj nasku idojn, mi konsilas loĝigi ilin individue en kaĝoj je proksimume du kubaj metroj, varmigataj je 18 gradoj, kaĝoj, kiuj havas komunikan fenestron inter la kaĝo de la masklo kaj tiu de la femalo; tio estas por pariĝado nur kiam la femalo estos preta kaj estos komencinta konstrui sian neston, tiam ni metos kune la paron, malfermante la komunikan pordon.

Seksokunigado kaj ovodemetado

La seksokunigado ĉe tiu birdo-genro estas tre brutala kaj agresiva. Estas la femalo kiu mem iras al la masklo, kaj reiras en sian apartamenton post la seksokunigado. Tiam ŝi demetos du ovojn. La ovodemetado

(Daŭrigo sur p. 20)



Kolibro

Tri poemoj

Kanto de la verdaj paseroj

— laŭ la melodio de fama germana popolkanto “migrado mia korplezur”

de EVA HOFFMANN (Germanio)

*Paseroj verdaj estas ni,
Sub bela stelo restas ni — de l' espero.
Modestan forton havas ni,
Sed bonan semon gardas ni — de l' espero.*

*La birdoj en la tuta mond',
La bestoj en la vasta rond' — komprenas sin.
Kaj tiu vasta mondkompren'
Estiĝu ankaŭ homa ben' — ja beno.*

*La semoj flugas tra la land',
Fariĝos plenkreskinta plant' — de l' amo.
Kaj semos amon en la orient',
Kaj semos amon en la okcident',
En sud' kaj nord' kreskados pli — la harmoni'!*

Espero

de MAX LECHIEN (Belgio)

*Se mi estus floro,
Mi estus rozo.
Se mi estus emocio,
Mi estus emocia.
Se mi estus karaktero,
Mi estus impetega.
Se mi estus vorto,
Mi estus la plej tenera.
Se mi estus opinio,
Mi estus kontraŭdira.*

*Se mi estus deziro,
Mi estus arda.
Se mi estus pasio,
Mi estus la vivo.
Se mi estus revo (songo),
Mi estus romantika.
Kaj se mi estus lingvo,
Mi estus Esperanto.*

Angoro

de LEANARDA SURBA
(Belorusio)



Leanarda Surba

*Krepuskaj griz-nigraj farboj.
Flustras folioj.
Susuras mistere arboj.
Pri kio?
maltrankviligas memoron
malklara io.
Kaj sangas denove la koro...
Pro kio?
Sopirenuigas mi sole
sen voĉo via.
La tristan animon konsoli
per kio?
Feliĉe revenu, amato,
gardu vin Dio!
Sen vi estas miaj korbatoj
por kio?*

TRI FILINOJ

(Tatara fabelo)

IU malriĉa virino havis tri filinojn. Tagojn kaj noktojn ŝi laboris por manĝigi kaj vesti ilin. Kaj la filinoj elkreskis rapide kiel hirundoj, vizaĝe similaj al hela luno.

Unu post alia ili edziniĝis kaj forveturis.

La patrino restis sola-soleca. Apud ŝi estis neniu krom ruĝflava sciureto.

La virino interparolis kun ĝi ĉiam, kiam ŝi fariĝis trista.

Pasis kelkaj jaroj. La patrino maljuniĝis. Kaj iun tagon ŝi serioze ekmalsanis.

— Sciureto, amiketo mia, — la patrino diris, — kuru al miaj filinoj, diru, ke ili venu al mi, kaj ilin urĝu!

Alkuris la sciureto al la plej aĝa filino kaj transdonis al ŝi la ordonon de la patrino.

— Aĥ, — ekĝemis la filino. — Mi estus ĝoja iri, tamen al mi necesas antaŭe purigi tiujn du pelvojn.

— Ĉu purigi du pelvojn? — ekkoleris la sciureto. — Do estu nedisigeb-la de ili!

Kaj la pelvoj tuj saltis de sur la tablo kaj ĉirkaŭprenis la plej aĝan filinon de supre kaj de malsupre. Ŝi falis teren, transformiĝis en grandan testudon kaj forrampis el la hejmo.

Ekkuris la sciureto al la dua filino kaj transdonis al ŝi la patrinan ordonon.

— Oj! — tiu respondis. — Mi kurus tuj al la patrino, tamen mi estas ege okupita. Mi devas teksti

tolon por la fiuro.

Ekkoleris la sciureto:

— Ĉu teksti tolonojn? Do tekstu ĝin ekde nun la tutan vivon, haltante neniam!

Kaj la dua filino transformiĝis en araneon.

Ekkuris la sciureto al la plej juna filino, kaj tiu tiutempe knedis paston.

Aŭdinte pri la trista sciigo, la filino diris neniun vorton, eĉ la manojn ne lavis, ekkuris al sia patrino.

Ŝi venis ĝustatempe kaj plibeligis al la patrino la lastajn horojn de ŝia vivo.

— Alportu ĉiam al homoj ĝojon, kara mia infano, — diris al ŝi la sciureto, — kaj la homoj estos gardantaj kaj amantaj vin kaj viajn gefilojn, genepojn kaj gepranepojn.

Kaj vere, la tria filino vivis multajn jarojn, kaj ĉiuj amis ŝin.

Kaj kiam venis al ŝi tempo morti, ŝi transformiĝis en oran abeleton.

Tutan someron tuttage la abeleto kolektas mielon por homoj, kaj ĝiaj antaŭaj piedetoj ĉiam estas kovritaj de dolĉa pasto.

Kaj vintre, kiam ĉirkaŭe ĉio pereas pro la malvarmo, la abeleto dormas en varma abelujo kaj dum fojfojaj vekiĝoj manĝas mielon kaj sukeron. ■

Esperantigis **Bronislav Ĉupin** (Rusio)



ĈINIO

● Reage al la Kampanjo 2000, la Internacia Agrikultura E-Asocio prezentis ideon fondi E-kursojn por agronomio kaj eldoni fakajn librojn en Esperanto.

Lastatempe oni produktis ole-ŝirmaĵon kontraŭ putriĝo de fruktarboj faritan de esperantisto Huang Yinbao de Gansu-provinco. Sur la pakumo, etiketo kaj reklamaĵo estas presita verda stelo kun litero E kiel marko.


● Dank' al la klopodo de esperantistoj de Hebei-provinco, Esperanto estas uzata kiel unu el la fremdaj lingvoj por promociiĝa ekzameno. Maje pli ol 80 esperantistoj partoprenis E-ekzamenon en Hebei-provinco. (Li Shude)

● Xiamen de Fujian-provinco daŭre uzas ĉi-jare Esperanton kiel fremdan lingvon por promociiĝa ekzameno. Lujiang-universitato funkciiĝas E-kurson por kandidatoj.

Ĉi-jare funkcias ankaŭ nedevi-

chang. Adr.: Jiaoyu Ban, Miaojie Xiang, CN-462541 Wugang, Henan, Ĉinio. (Guo Minchang)

● La unuan de majo la Guilin-a Popola Radio de Guangxi dissendis 12-minutan programon pri Esperanto. Anoncisto de la radio kaj esperantisto Lu Jixin konversaciis pri apliko de Esperanto. Lu konigis la rolon de Esperanto en internacia komunikado.



SALUTON

EL MORAVIO



SALUTON EL

PROSTEJOV

Poŝtkartoj el Ĉeĥio

ga E-kurso en Lujiang-universitato kun 36 lernohoroj semestre. Dum la pasinta pli ol unu jaro pli ol 100 instruistoj kaj studentoj lernis en la kurso. Dank' al la klopodo de studentoj, fondiĝis ankaŭ la E-studrondo de Lujiang-universitato. (Wang Yamin)

● Lastatempe vestofabrika de la urbo Wugang, Henan-provinco, produktis vestojn kun marko "Espero". Sur la vestoj estas signo de Esperanto. Bonvolu kontaktiĝi kun Guo Min-

ĈEĤIO

● Esperanto Klubo Prostejov, kiu fondiĝis en 1909, eldonis Esperantajn poŝtkartojn, glumarkojn kaj insignojn de la klubo. Kontakta adreso: Jiri Kincl, Jana Zrzaveho 2, 796 04 Prostejov, Ĉeĥio. (Jiri Kincl)

KOLOMBIO

● La Kvara Tutamerika Kongreso de Esperanto okazos de la 27-a de januaro ĝis la 3-a de februaro 1999 en Bogoto, Kolombio. Detalaj informoj riceveblas ĉe: Apartado Postal No. 54800, Santafe de Bogota, Kolombio.

KUBO

● La Dua Kultura Festivalo de Esperanto okazos de la 20-a ĝis la 22-a de novembro 1998 en Santjago, nun la dua plej grava urbo de Kubo, ĉirkaŭata de maro kaj montoj. La slogano de la festivalo estos: Frateco, Paco, Amikeco. Dum tri tagoj oni ĝuos prelegojn, artajn prezentojn deklame, teatre, muzike. La temoj de la prelegoj rilatos al jenaj aspektoj: Esperanto kiel kulturponto interpopola; Esperanto kaj ekologio; Esperanto kaj frateco interhoma; Esperanto kiel fonto de amo, paco kaj lumo al jaro 2000. Aliĝkotizo kostas 395 USD inkluzive aviadilan transportadon de Havano al Santjago kaj reen kaj septagan restadon en hotelo kun maten- kaj vespermanĝo. (Radio Havano Kubo)

Kiam vi bezonas urĝan helpon en Ĉinio...

DE kiu petas vi, alilanda turisto, kiam vi, sen amiko ĉe vi kaj ne scipovante paroli ĉine, bezonas urĝan helpon en Ĉinio? Bonvolu do telefoni laŭ telefon-numero (86-10) 64629199. Ricevinte la telefonaĵon, oni tuj venas helpi vin.

Tio estas telefon-numero de la pekina oficejo de la Azia Urĝa Helpo (AUH), kiu servas tage kaj nokte en la lingvoj ĉina, angla, japana, franca, germana, hispana, dana kaj rusa per la jeno: savi suferantojn el danĝero; doni plej efikan kuracadon al suferantoj kaj plej rapide porti ilin al plej bona hospitalo; kaj akompani, se necese, suferantojn al la patrujo aŭ al lando kun pli bonaj kuracaj kondiĉoj.

Krom la menciitaj, AUH donas ankaŭ aliajn servojn, ekz., serĉi bankon plej proksiman por la turistoj, kiuj bezonas ŝanĝi ĉekon aŭ monon; kontakti flugkompanion por serĉi pakaĵon perditan aŭ ŝtelitan; tuttage servi por komuniki al turistoj informojn senditajn de iliaj familianoj kaj kolegoj; doni konsilojn al turistoj, kiuj havas leĝan konflikton; fari specialan aranĝon por turistoj mortintaj en Ĉinio, ktp.

Dank' al la aŭspicioj de francoj, AUH fondiĝis fine de la 70-

aj jaroj, ĝia ĉefstabejo sidas en Singapuro kaj ĝia pekina oficejo estis starigita en julio 1989, kiel unu el la 19 informejoj de AUH en la mondo, kiuj funkcias 24 horojn ĉiutage. Nun AUH servas al 1.2 mil kompanioj, 120 asekuraj kompanioj kaj 20 establoj de kreditkartoj de la mondo. Ĉiujare ĝi servas meznombro al 11 mil personoj.

En la pekina oficejo de AUH la laborantoj el diversaj landoj streĉe laboras. Meze de la oficejo estas informejo pri urĝa helpo. Tie la laborantoj sidas ĉe telefonoj kaj komputeroj, kiuj interligas diversajn lokojn de la mondo. Ili estas pretaj servi al petantoj iam ajn. Ili devas alparoli la telefonanton maksimume tri sekundojn post kiam la telefono eksonis. La kapablaj devas ne nur flue paroli plurajn lingvojn, sed ankaŭ sufiĉe lerti en trakonekto kaj kunaranĝo kun rilataj organizoj kaj persone iri al la loko por doni ĝustatempan helpon. Mi informiĝis de Cui Heping, konsilis-

to de la fako de publikaj rilatoj de AUH, ke la tieaj laborantoj, kies averaĝa aĝo estas malpli ol 26 jaroj, ĉiuj sin montris aplombaj, kapablaj kaj spertaj antaŭ akcidentoj.

En la 8-a de oktobro 1992



En la pekina oficejo de AUH

okazis kraŝo en Lanzhou, nord-okcidenta Ĉinio. Informiĝinte pri tio, laboranto de AUH kontaktiĝis kun rilata departemento. 30 minutojn poste, jam pretis aviadilo Boeing 737. Poste, la laboranto, konsulino de Francio en Ĉinio, laboranto de la nacia turisma buroo de Ĉinio kaj kvar kuracistoj kune flugis al Lanzhou por savi la vunditojn. 40 horojn poste, la lastaj estis eskortitaj al Francio.

Post tio, AUH invitis plej



Laborantoj de AUH en urĝa savo

spertajn plastiistojn kaj kvarantenigistojn de Pekino al Lanzhou por la mortintoj. Laŭ la trajtoj donitaj de iliaj familianoj, laborantoj de AUH identigis la mortintojn post ripetada ekzameno. Je mencio pri tio la franca konsulino diris: "La aviadila akcidento estas malfeliĉa, tamen tio, kio okazis en Gansu, estas aparte kortuŝa."

Alia grava parto de la peki-na oficejo de AUH estas malgranda kuracejo, frekventata de multaj alilandanoj en Pekino. Ĝi povas kontentigi la bezonon de pacientoj. La tieaj kuracistoj el 18 landoj ne nur havas altan kurac-teknikon, sed ankaŭ kreas al la kuracatoj atmosferon similan al tiu en ilia patrujo. Mi vidis, ke en la atendejo de la kuracejo iuj gaje babilas kaj aliaj foliumas sialandajn gazetojn; en la ĉambro kun radioaparato maljunuloj ekzamenitaj iom

babilas kun kuracisto antaŭ ol forlasi la ĉambron; en la stomatologia fako la dentistoj kuracas malsanulojn kun rideto kaj diras ion al ili. La tieaj kuracistoj estas ĉiam pretaj ankaŭ savi vunditojn.

En la unuaj tagoj de aŭgusto 1994 iu japana turistino subite grave malsaniĝis dum vojaĝo en Tibeto. Informiĝinte pri tio, AUH tuj sendis siajn laborantojn flugi al Tibeto por savi ŝin. Pro alta altitudo de Tibeto kaj ĝia malbona vetero oni prenis malgrandan helikopteron survoje, kiu povis enteni nur du kuracistojn, aŭstralian kaj ĉinan. Kiam ili estis revenantaj de Tibeto kun la malsanulino, tondris kaj pluvegis. Ekster la kajuto densaj pluveroj vualis. La helikoptero flugis inter glaciaj montoj kaj alfrontis danĝeron kolizii kontraŭ krutaĵo; en la kajuto la du kuracistoj en vatita mantelo, spirante per ok-

sigenbotelo, prizorgis la malsanulinojn tutanime.

Cui Heping, kiu klopodis por ke AUH funkciu ankaŭ en Ĉinio, diris, ke antaŭe estis la ĉina registaro, kiu respondecis pri tia urĝhelpa servo. Kompreneble, AUH, kun fakuloj, specialaj ekipaĵoj, internaciaj retoj telekomunika kaj urĝhelpa estas pli kompetenta kaj pli kapabla ol la urĝhelpa taĉmento provizore organizita de la registaro. Pro tio Ĉinio donas pli kaj pli grandan atenton al AUH. En la lastaj jaroj AUH estis plurfoje destinita kiel la unika urĝhelpa organizo por internaciaj aktivadoj okazintaj en Ĉinio. Ĝi sukcesis doni urĝajn kaj efikajn servojn al la 43-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso, la 4-a Monda Konferenco de Virinoj, la 30-a Internacia Geologia Konferenco kaj aliaj gravaj aktivadoj. Dank' al la subteno de diversnivelaĵ registaroj de Ĉinio, AUH posedas informojn kiel sian kernon kaj kuracajn retojn kiel sian rezervforton. La supre menciita japana turistino opiniis en la komenco, ke ŝi estas nesavebla, sed kiam ŝi rekonsciiĝis, ŝi rimarkis, ke ŝi kuŝas en la plej bona hospitalo en Pekino. Tamen ŝi ne sciis, ke por savi ŝin la ĉina aerarmeo sendis helikopteron plej bonan kaj piloton plej elstaran, kaj samtempe, la hospitalo venigis eminentajn kuracistojn el diversaj fakoj kaj flegistinojn, scipovantajn paroli japane.

Post AUH estis starigitaj en Ĉinio aliaj internaciaj urĝhelpaj kompanioj, kio internaciigis kaj specialigis la servojn al alilandanoj en Ĉinio. Do, antaŭ la vojaĝo al Ĉinio bonvolu kompari ilin unu kun alia. Krom ordinara turisma asekuro, vi povus elekti ankaŭ asekuron kun kuracado kaj aliaj servoj por faciligi al vi la vojaĝon. ■

Junaj volontuloj servas en la kamparo

de JIN SIYU

Volontuloj aktivas ĉie tra la tuta mondo. Inter ili troviĝas ankaŭ junaj e-istoj. La Kampanjo Junaj Ĉinaj Volontuloj komenciĝis en 1993 kaj rapide evoluas. Laŭ nekompleta statistiko, la ĉinaj junuloj partoprenis volontuladon je 72.4 milionoj da hom/fojoj, entute 3.1 miliardojn da horoj. Antaŭ nelonge, mi konatiĝis kun altstatura junulo Jin Siyu, direktoro de la oficejo de la Ĉina Juna-Volontula Asocio. Li multe konas kaj persone spertas la aktivadon de ĉinaj volontuloj. Mi devas diri, ke por la kampanjo li estas kaj talenta organizanto kaj entuziasma praktikanto. Jen lia artikolo temanta pri laboro de junaj urbaj volontuloj, kiuj servas en kamparo ĉefe por plibonigi la tieajn edukadon, teknikon kaj publikan sanon.

Yu Tao

INSTRUI KAMPARAJN INFANOJN

Kiam Zhang Yanhong kaj aliaj kvar volontuloj adiaŭis Jingle-gubernion de Shanxi-provinco, kie ili laboris en elementa lernejo, ili spertis tre kortuŝan momenton — centoj da montvilaĝaj infanoj kun larmoj en la okuloj ĉirkaŭis ilin. La infanoj, brakumante la junajn volontulojn, diris foje-refoje: “Ne foriru, instruisto!”, “Kara instruisto, nepre revenu viziti nin!” Venis ankaŭ kamparanoj eĉ el fora vilaĝo. Ili donacis al la volontuloj fazeolojn nove rikoltitajn kaj maizaĵon ĵus rostitan. La aŭto startis, ĉiuj ekploris. La kamparanoj kaj infanoj postkuris la aŭton kaj svingis la manon longe, longe. En la aŭto la junaj volontuloj ne povis deteni sin de larmoj. Ili rememoris la tagojn, kiujn ili travivis kun la naivaj infanoj kaj honestaj kamparanoj.

En 1996 multaj junuloj el Pekino, Ŝanhajo, Jiangsu, Guangdong, Heilongjiang kaj aliaj lokoj

en Ĉinio aliĝis al “Jingle-Programo”, parto de “Stafeta Servado de Junaj Ĉinaj Volontuloj al Malriĉaj Lokoj”. 22 junuloj fariĝis unuaj volontuloj en Jingle. Multaj el ili diplomitiĝis el altlernejo. De novembro 1996 ili volontulis 10 monatojn kiel instruisto en mez- kaj elementlernejoj, inĝeniero, kuracisto kaj

flegisto.

Tiam Zhang Yanhong estis nur 20-jara. Ŝi venis de Pekino kaj servis en Xincun-vilaĝo en la elementlernejo Espero konstruita finance de la Muzeo de la Imperiestra Palaco de Pekino. Ĉiusemajne ŝi donis minimume 22 lecionojn de la ĉina lingvo kaj matematiko. Foje en ferioj ŝi re-



Jin Siyu (maldekstre) kaj volontuloj en Jingle-gubernio

venis Pekinon kaj kolektis donacojn por la infanoj — 1 500 vestoj, 2 500 libroj, skribilujoj, kraĵonoj ktp.

Foriris la unuaj 22 volontuloj, la stafetan bastoneton transprenis la duaj 16 junuloj. Ili servis ankaŭ pri edukado, agrikultura tekniko kaj kuracado.

FORIGI MALRIĈECON PER SCIENCO


Ĉinio estas agrikultura lando. Malriĉeco, malalta edukiteco, manko de sciencaj scioj, ĉio ĉi baras la evoluon de la ĉina agrikulturo. Por kulturaj teknikistojn, la Ĉina Juna-Volontula Asocio faris multajn programojn por diskonigi la agrikulturan sciencan kaj altigi la teknikan nivelon en la kamparo.

Han Fajun, volontulo de "Jingle-Programo", laboris en aven-faruna prilaborejo de la gubernio. Per sia talento li projektis planon, instalis maŝinon, produktis kaj diskonigis novan varon. Li disvastigis merkaton por serio de produktaĵoj de la prilaborejo.

En vilaĝoj norde de Shenyang de Liaoning-provinco aktivis pli ol 100 grupoj de volontuloj, kiuj diskonigas agrikulturajn teknikojn kaj informojn. En tiuj vilaĝoj ili faris pli ol 120 prelegojn, ĉ. 10 000 kamparaj junuloj lernis de ili agrikulturan teknikon.

En Nankino centoj da junuloj en libertempo iris al la kamparo por transformi 6.6 hektarojn da kavaj kampoj. Tie ili plantis rizidojn kaj metis 80 000 parasilurojn (*Parasilurus*) en la rizkampojn. Bredi fiŝojn en rizkampoj estas nova tekniko, kiun oni akiris post longtempa praktikado. La klopodo de urbaj volontuloj kaj kamparaj junuloj ŝanĝis la dezertajn kampojn en "oran basenon", kie oni rikoltas rizon kaj parasilurojn.

En Lianzhou de Guangdong-provinco loka juna-volontula



En ripoztago junaj volontuloj vizitas maljunulinon.

asocio starigis la Trejnan Centron de Ŝafobredado, kiu disvastigas inter malriĉaj kamparanoj la teknikon "bredi ŝafojn en korto". La centro ankaŭ helpas la kamparanojn en vendado de ŝafoj. Formiĝis kompleta servosistemo por ŝafobredistoj.

POR LA SANO DE KAMPARANOJ

Kuracisto Chen Qiyi el Ŝanhajo volontulis en Jingle-hospitalo. Ŝi tutkore servis la lokanojn, kaj ili nomis ŝin "anĝelo en blanka kitelo". Vidinte, ke mankas mono al la kamparanoj por kuraci sian malsanon kaj la loka hospitalo ne estas bone ekipita, ŝi skribis en ferioj de la Printempa Festo raportaĵon pri Jingle por ĵurnalo de Ŝanhajo kaj laŭ ŝia peto koncerna kompanio donacis al la hospitalo medikamentojn kun valoro de 100 000 juanoj.

"Baise-Programo" komencita en junio 1997 celas helpi Baise-gubernion de Guangxi, kiu multe kontribuis al la batalo por la fondiĝo de la nova Ĉinio, tamen nun ne estas riĉa pro la geografia situo. Tie servis 20 volontuloj. Tan Xuezhi estis kuracisto en

geologia esplora grupo. En Baise li laboris kiel kuracisto en tre fora Dajiang. Por kuraci malsanulon, foje li piediris 5-6 horojn sur monta vojo. Li servas al kamparanoj ankaŭ en libertempo. Kun aliaj volontuloj li faris korporekzamenon 350 hom/fojojn por lokaj lernantoj.


La servado de volontuloj en Jingle kaj Baise estas parto de "Stafeta Servado de Junaj Ĉinaj Volontuloj al Malriĉaj Lokoj". La sukceso de "Jingle-Programo" faris bonan komencon por la tuta kampanjo. Kontrolinte la plenumon de "Jingle-Programo", respondeculo pri Volontula Organizado de Disvolva Programo de UN diris: "Tiu sperto estas tre sugesta por ni apliki internacian volontuladon por forigi malriĉecon en Ĉinio. La varbado kaj administrado de volontuloj kaj la aplikado de la tuta sistemo estas lernindaj por ni." Nun la kampanjo estas lanĉita en Shanxi, Guangxi, Yunnan, Zhejiang, Jiangxi, Hubei kaj la urboj Tangshan, Dalian, Guiyang... kaj disvastigas al pli ol 20 aliaj provincoj. La Ĉina Juna-Volontula Asocio planas varbi 10 000 junulojn, kiuj servos en 500 gubernioj en la venontaj 5 jaroj. ■

Donaco por la infanoj

Fotoj de LIU SIGONG

En la 1-a de junio, festo de la infanoj, la Ĉina Centra Televido okazigis Artan Vesperon "Amo-steloj plenigas la ĉielon" por la 300 milionoj da geknaboj de Ĉinio.

La interesaj programeroj multe ĝojigis diversaĝajn infanojn.



Interesa prezentado de "Kokobatalo"



Humura teatraĵo "Mi estu infano"



Teatraĵo "Gaja festo"

Danco "Ekskurso en printempo"



Pekina opero "Sur fruktomonto"



Muzika teatraĵo "Blua birdo"

For la kaŝemo!

Samideano May Bijleveld montris problemon vidatan preskaŭ en ĉiuj landoj, kie estas Esperanto. Kiel artefarita internacia helpa lingvo, Esperanto estas ankoraŭ juna kaj bezonas disvastigon, kaj ĝuste el tiu motivo oni antaŭenigas la Esperantan movadon. En la pasintaj pli ol 100 jaroj tiu movado atingis sendube rimarkindajn sukcesojn, tamen oni vidis ankaŭ ĝiajn mankojn. Se oni neglektas ilin dum longa tempo, tio certe malutilos al Esperanto kaj ĝia movado. La Kampanjo 2000 lanĉita de UEA ja celas levi la kvaliton de Esp-organizoj, grandigi la diskonatecon de Esperanto kaj influi la socian vivon de la mondo. Kaj la ideo de May Bijleveld ja estas pozitiva reago al la Kampanjo.

La Red.

EBLE mi ne pravus, se mi diras, ke preskaŭ en ĉiuj landoj la Esperanto-literaturo (libroj kaj revuoj) ne aperas en la ordinaraĵoj librovendejoj, nek en la kioskoj. Mi konas nur malmultajn landojn.

Ĝenerale ni konservas nian plej grandan trezoron en la ŝranko de la kluboj, kie nur la esperantistoj povas vidi ĝin.

Plurfoje okazis, ke iu amiko, kun kiu mi parolis pri Esperanto, poste diris al mi: "Kiam mi estis en librovendejo, mi demandis ĉu ili havas Esperantajn librojn. Nea respondo. Poste mi demandis en

aliaj librovendejoj. Nenie oni havas tion. Via ideo estas utopio. Esperanto jam mortis."

Tio estas nia kulpo. Ni suferas de kaŝemo.

Imagu la kontraŭon: En ĉiu urbo, kie estas Esperanto-organizaĵoj, oni prezentas Esp-librojn al la vendejoj kaj iom da bona informmaterialo. Tio estus senfina tutmonda ekspozicio.

Ankaŭ ni povus peti kelkajn esperantistojn, kiuj abonas gravajn revuojn, doni kelkajn, eĉ malnovajn ekzemplerojn por distribui al kioskoj kaj montri ilin inter la aliaj revuoj. Mi garantias, ke

multaj personoj demandos, kiu lingvo estas tio. La vendisto devas havi informmaterialon kun adresoj kaj telefonnumeroj. Ni povas proponi senpagajn lecionojn al la vendisto.

La plej taŭgaj personoj por distribui tion al vendejoj kaj al kioskoj estas la novaj emeritoj. Ili havas multe pli da tempo ol la laborantoj kaj jam multe da vivsperto. Kaj fizike ili ankoraŭ estas fortaj.

Ni devas montri, ke ni ekzistas.

NI IRU DE KAŜEMO AL MONTREMO! ■

(Daŭrigo de p. 10)

okazas maksimume du aŭ tri tagojn post la seksokunigado. Refermu la komunikan pordon; la masklo finis sian laboron, kaj la femalo sola kovos kaj bredos siajn idojn.

Eloviĝo kaj bredado

Post 14-taga kovado, unu aŭ du birdidoj naskiĝos. Tiam la femalo nutros ilin per drozofiloj, kiujn ŝi ĉasados kaj al kiuj ŝi almetos nektaron, ŝi regurgitos al sia idaro. Post 23 tagoj, la idoj eliros el la nesto kaj la patrino ĉesigos la nutradon post deko da tagoj. Tiel iras la reproduktado de la kolibroj!

Konsiloj

Sed ne iluziiĝu, tiu bredado plenumos viajn

dezirojn, sed vi ne rajtas erari kaj se tio ŝajnas tre simpla, ne estas tiele, ĉar multaj ovodemetaĵoj estas nefekundigitaj kaj, bedaŭrinde, ne ĉiuj idoj alvenos al la normala tempolimo.

Jen miaj propraj rezultadoj pri la bredado de kolibroj "Corruscant":

En 1994: kun 4 paroj, 2 idoj

En 1995: kun 6 paroj, 3 idoj

Sed kia feliĉo kaj ĝojo estas posedi kaj prezenti tiun genran birdon! Sole amo al kolibroj permesos al vi eble iam ĝui la sukceson kaj feliĉon, kiujn mi spertas nuntempe.

Mi esperas, ke tiuj kelkaj frazoj transdonos al vi la pasion, kiun mi sentas ĉiutage. ■

Desegnitaj homaj vizaĝoj en pekina opero

de PANG NAIYING

POST 30-jara akvarelado de pejzaĝoj li volis ankaŭ lerni ion alian. Iutage li hazarde desegnis homan vizaĝon en pekina opero. Ĝi estis vaste ŝatata. Do, li absorbiĝis en pentrado de homaj vizaĝoj en pekina opero. Li estas Bai Longhua. Li diris, ke li nerimarkite ekamis pekinan operon. Lia patro estis sperta aprento de pekina opero. Pro tio, en sia infanaĝo li estis ofte kondukita al teatro por spekti pekinan operon. Tiam ĉiuj personoj sur la scenejo, ĉu kuraĝa rolo, ĉu humura amuzisto, ĉu nobela damo, estis por li idoloj; poste, kiam li okupis sin pri pentrado de homaj vizaĝoj en pekina opero, tiuj figuroj viditaj de li en lia infanaĝo reaperadis en lia kapo.

La brokataj kostumoj de surscenaj roloj estas brile pompaj. Dum pentrado s-ro Bai trovis, ke la koloroj de farboj ne povas rivali kun tiuj de silko. Pro tio dujare li faris bildojn el silko kaj tolo. Kvankam tio estis interesa por li, tamen li trovis tion pure metiarta. Do li komencis sian novan provadon: li uzis tranĉileton kaj aliajn malmolajn ilojn anstataŭ penikon kaj faris pentraĵojn per farboj kun pulvoro, miksitaj kun akvo. Tiel la koloroj de liaj verkoj fariĝis tre plaĉaj. En tiu maniero li desegnis aron da homaj vizaĝoj en pekina opero.

Ĉina teatra arto karakteriziĝas per ŝminkado. Laŭ difinitaj reguloj kaj normoj oni desegnas per farboj troigitajn bildojn sur la vizaĝo de aktoroj. La koloroj kaj desegnaĵoj montras laŭdon aŭ mallaŭdon. El tio montriĝas la karakteroj kaj trajtoj de la roloj.

Ekz., tiuj kun ruĝa vizaĝo plejparte estas lojalaj kaj bravaj, tiuj kun nigra — honestaj kaj facilanimaj kaj tiuj kun blanka — insidemaj kaj ruzaj. Sur la tempioj de imperiestro desegniĝas suno aŭ drako, sur la vizaĝo de nubodio belas koloraj nuboj, kaj la nazo de amuzistoj estas blanke ŝminkita...



Bai Longhua en pentrado

Per la tradicia ĉina liberstila pentrado kaj kontrasto kaj harmonio de koloroj s-ro Bai desegnis homajn vizaĝojn en pekina opero kun riĉa esprimo. Lia verko "Elegio ĉe Wujiang-rivero" montras la vizaĝon de Xiang Yu (232-202 a.K.), fama generalo kuraĝa, sed neruza, kiu malvenkis en batalo kontraŭ fortaj malamikoj kaj sin mortigis ĉe Wujiang-rivero. La verko manifestas la doloron, malamon, malvolontecon kaj senpovecon de tiu tragedia heroo antaŭ la sinmortigo. Ĝi estis premiita en la Internacia Ekspozicio de Orientaj Tuĉpentraĵoj okazinta en Kanado kaj laŭdata de spektantoj kiel verko simila al okcidenta abstrakta artaĵo.

Simile al la ĉina liberstila pentraĵo, pekina opero prezentas personojn kun troigo kaj en libera stilo. Tial s-ro Bai komponis siajn verkojn per luksaj koloroj kaj en libera stilo por bone montri la malcedemon kaj justamon de la herooj.

Zhang Fei, heroo en la klasika ĉina romano "Tri Regno", estis brava kaj flamiĝema, tamen subtila. Kiam li funkciis kiel guberniestro, iu aĉulo intencis perforti virinon, sed malsukcesis, do la aĉulo misakuzis antaŭ li, ke la virino ŝtelis liajn akvomelonojn. Rigardinte la virinon kun bebo en la brakoj kaj la tri grandajn akvomelonojn sur la tero, Zhang Fei komprenis, kio okazis. Li diris al la virino: "Portu tiujn tri akvomelonojn kaj ankaŭ vian bebon..." La verko "Zhang Fei pridemandas akvomelonojn" montras la humurecon kaj bonkonrecon de Zhang Fei.

Li Kui, heroo en alia fama ĉina klasika romano, estis honesta, bonkora kaj tre lerta en batalo. Sin alivestinte kiel Li Kui, iu fiulo iris en arbaron por prirabi pasantojn. Foje, Li Kui renkontis la falsan. Li surpriziĝis kaj trovis tion ridinda. Do, li decidis mistifiki la falsan. La verko "Vera Li Kui kaj falsa Li Kui" prezentas tiun intrigon. La du similaj vizaĝoj reciprokis la rigardon fiksan. Laŭ iliaj malsamaj mienoj ne estas malfacile distingi, kiu estas vera kaj kiu falsa.

Ĉiuj verkoj de s-ro Bai naskiĝis el rakontoj. Se li ne bone konus la intrigojn kaj rolojn, li ne kapablus fari tiujn verkojn kaj oni ne povus kompreni ilin. ■




Vizaço de Xiang Yu

张
翥
审
瓜

张翥到真县安插百姓
苦状亦甚以一书呼了双方

Artifika evakuo el urbo



Ankaŭ tie estas vidindaĵoj

Teksto de PANG NAIYING
Fotoj de LIU SIGONG

KUN mirindaj montpintoj ĉe siaj bordoj Lijiang-rivero aspektas kiel longa pentraĵo, ĉe kies suda ekstremo situas la urbo Yangshuo (mi verkis koncernan artikolon “Strato de Alilandanoj” publikigitan en la 9-a numero, 1997). De Yangshuo ni ŝipveturis norden al la urbeto Xingping. Kvankam proksima al Yangshuo, Xingping, sen kuriozaĵejo, sen bufedejo, sen “strato de alilandanoj”, kontrastas kun ĝia movopleneco. Someran nokton, kiam turistoj en Yangshuo ĝuas bieron kun akompano de kandela lumo kaj serenado ĝis tagiĝo, ĉe la transa bordo Xingping-anoj dolĉe dormas, tamen ne ĉiu estas tia: Sur la rivero ankoraŭ brilas lampo en la boato de fiŝisto Liusi; en laborejo de dolĉa fritita rizaĵo virino pistas rizon; profunde de kvietaj strateto de tempo al tempo aŭdiĝas frapado de lignoŝuoj sur ŝtonplata vojsurfaco...

En la urbeto ĉie kreskas bambuoj. Kiel etendiĝanta vosto de

pavo ili verdigas ne nur Lijiang-riveron, sed ankaŭ la sunon spegulitan en la rivero. Kiam la luno aperas, Liusi movas sian bambufloson por fiŝkaptado. Sur la bambufloso pendas gaslampo, sub kiu staras vico da fiŝagloj. Aspektante senspritaĵoj, la fiŝagloj fakte estas inteligentaj. Ĉiufoje, kiam alnaĝas fiŝoj allogitaj de la lamplumo, la fiŝagloj, ĉe ordono de la mastro, tuj plonĝas en la akvon por ĉasi la fiŝojn. Samtempe la fiŝisto kaj krias por kuraĝigi la fiŝaglojn kaj skuas la bambufloson por timigi la fiŝojn. Tiamaniere la fiŝagloj kaptas ilin, donas la grandajn al la mastro kaj restigas la malgrandajn por si mem.

Dek du fiŝagloj, du bambuflosoj, unu ligna boato kaj unu fera boato, ĉio ĉi tio garantias la vivon de la kvin familianoj de Liusi. Per la mono akirita en vendado de fiŝoj ili konstruis malgrandan etaĝdomon. La bambufloso ja estas hejmo de la fiŝagloj. Tial eĉ en ventopluva nokto, kiam ne eblas fiŝkapti, Liusi dormas

sur la bambufloso por akompani la fiŝaglojn.

Fiŝboata lampo, fiŝagloj kaj simpla vivmaniero de fiŝistoj vekis scivolemon de alilandanoj, kaj tial ĉi tiuj gastis ĉe Liusi. Antaŭ 20 jaroj, kiam li estis 16-jara, li komencis fiŝkapti. Li estas silenta, tamen babilema menciante fiŝaglojn. Li diris, ke la fiŝagloj, kun palmo-piedoj kaj agla beko, estas pereontaj. Nuntempe oni ne plu fiŝkaptas per ili, kaj ilia generpovo estas malalta. La fiŝaglino demetas ĉiuprintempe nur 7-10 ovojn. Anstataŭ senkapablaj fiŝaglinoj kokinoj kovas iliajn ovojn, kaj nur 3-4% de la elkovitaj povas vivi. Ĝenerale la vivdaŭro de fiŝaglo estas 20 jaroj. Inter la fiŝagloj de Liusi la plej aĝa estas 12-jara. Ĝi povas kapti 5 kg da fiŝoj ĉiutage. La fiŝagloj manĝas nur fiŝojn. La por ili nedigesteblaj fiŝostoj miksitaj kun ilia stomaka suko laŭdire estas utilaj por kuraci tiroidan malsanon.

La gastoj per videoregis-

tratoro registris, kiel Liusi fiŝkaptas, kiel lia filo vizitas lernejon, eĉ kiel la tuta familio manĝas, babilas, iras al foiro kaj vendas fiŝojn. La nomo Liusi signifas sesdek-kvar. La gastoj demandis, kial li tiel nomiĝas. Li diris, ke li naskiĝis en la jaro, kiam lia avo aĝis 64 jarojn. La lokaj maljunuloj opinias, ke nur viro povas daŭrigi la generacion, kaj naskiĝo de knabo estas ĝojiga por la familio. Laŭ la loka moro, la avo nomas la nepon per sia aĝo.

Kiam la knaboj elkreskas, ili nature fiŝistiĝas. La belaj montoj kaj kvietaj rivero ebligas al ili esti for de furiozaj ondoj kaj kruela suno. Tial ili ne havas brunan haŭton nek fortikajn muskolojn kiel la maraj fiŝistoj. Sed iam tiuj viroj remantaj ĉiutage inter verdaj montoj volas montri sian virecon, ili do laŭte krias: “Ŭu — Ŭej —” La inter montoj sonanta krio ofte vekas respondon de alia fiŝisto malantaŭ la monto.

Estis hazarde por mi viziti la laborejon de dolĉa fritita rizaĵo de sinjorino Lü. Tiun tagon la vazoj por peklita legomo antaŭ la domo interesis min. Dum mia aprecio la knabo, kiu sidante ĉe la pordo ludis ŝtonetojn, levis la kapon kaj demandis: “Ĉu vi volas dolĉan frititan rizaĵon? Mia patrino scipovas fari ĝin. Bonvolu eniri.” Li kondukis min en duon-subteran ĉambro, kie regis malhelo. Vidiĝis dika ligna pistilo. Ĝia unu ekstremo estas fikse metita sur ŝtonŝtipon kaj ĝia alia ekstremo super ŝtona pistujo. Kiam la mastrino piedpremis la fiksitajn ekstremojn de la pistilo, la alia ekstremo jen levis jen mallevis por pulvorigi la malsekigitajn gluecajn rizgrajnojn en la pistujo... Mi ekstaze spektis tion, ĝis la knabo enmanigis al mi paketon da dolĉa fritita rizaĵo kun diafana olepapiro kiel pakumo, sur kiu estas ĉinaj idogramoj “Lü-familia Dolĉa Friti-

ta Rizaĵo”. La kafkolora dolĉa rizaĵo estas fragila kaj bonodora. La mastrino diris, ke la famon de dolĉa rizaĵo de Xingping oni ŝuldas al la praulo de la familio Feng, kiu origine faris la dolĉan rizaĵon kaj heredigis la metiarton al la kvara generacio.

Fari dolĉan rizaĵon estas laciĝe. Ĉiutage ekde la 3-a frumatene ŝi pistas 50 kg da rizo, fritas la pistitan rizfarunon en ĉerizo-similajn bulojn kaj tegas la bulojn per fluidigita sukero. Kiam la Printempa Festo venas, eĉ 75 kg da rizaĵo ne povas kontentigi la bezonon de klientoj. Feliĉe, tiam hejmenreveninte, ŝin helpas la gefiloj, kiuj aŭ laboras aŭ lernas ekster la hejmloko.

Mi tranoktis ĉe ŝi kaj ni pri ĉio babilis. Ŝi akceptis min kiel sian familianon, do kiam mi helpis ŝin pisti rizon aŭ ventumi rizfarunon, ŝi ridetis anstataŭ haltigi min. Ĉe mia foriro ŝi donacis al mi 8 paketojn da dolĉa rizaĵo: “Franjo, gustumu ankaŭ la gepatroj.” Ŝia sincera amikeco estis nerifuzebila. Kiel ĝoja mia patro estus ĝuante la dolĉan rizaĵon, se li ankoraŭ vivus!

Kiam pluvigis, ĉie sur la strato sonis lignaj ŝuoj. La ŝuisto ŝatas la sonon samkiel la malnovan


kanton, kiu priskribas, ke luno leviĝis super la stepon kaj junulo sopiris sian amatinon... La sento kaj lia juneco ambaŭ apartenis al la 50-aj jaroj. Nun griziĝis liaj haroj, pasis ĉiuj sortoŝanĝoj, li solece vivas. Tamen anstataŭ paroli pri siaj travivaĵoj li diris: La lignaj ŝuoj havas historion de almenaŭ 1 500 jaroj. Pro varma vetero kaj ofta pluvo ni sudanoj deantikve ŝatas porti ŝuojn lignajn aŭ palmajn. Tiaj ŝuoj, komfortaj kaj protektantaj kontraŭ piedmalsano, estas pli avantaĝaj ol plastaj galoŝoj aŭ babuŝoj... Dirante li montris al mi paron da ŝuoj el melia ligno kun belaj vejnoj. Kaj la reciproke sin frapantaj ŝuoj klare kaj oreplacĉe sonis. “Tian sonon vi ne aŭdas en urbo, kie aŭdiĝas nur bruoj de aŭtoj. Tro brue,” la maljunulo kapskuis.

Escepte de la tagoj, kiam li iras al kamparo por aĉeti lignon, kutime li sidas en la ĉefa ĉambro fronte al la strato kaj faras absorbite lignajn ŝuojn. “Fari lignajn ŝuojn estas malfacile,” li diris. Unue, oni segas la lignon en partojn oblongajn, poste laŭ planda mezuro fajlas la lignopartojn, poluras ilin kaj alnajlas al ili bendon... Li faras du parojn da ŝuoj ĉiutage, unu paro vendiĝas


(Daŭrigo sur p. 49)

Antaŭ ekveturo







Loĝdomoj en la urbeto




Malgranda restoracio



Fiŝado sur Liĵiang-rivero



Maljunulo en farado de lignaj ŝuoj



Korto

MALFACILA LIMIGO DE FUMADO

Regularo de limigo de fumado, publikigita de la centra registaro de Ĉinio, ekvalidis la 1-an de majo 1997, kaj estas subtenata de la publiko kaj precipe de la nefumantoj. La regularo difinas, ke estas malpermesate fumi en ĉiuj publikaj trafikiloj, ekz. trajnoj, subtrajnoj kaj aŭtobusoj. La reklamoj de cigaredoj estas malpermesitaj ankaŭ en la vagonoj. La malobservantoj estos punitaj.

La regularo iagrade protektas la nefumantojn. En Ĉinio estas ĉ. 300 milionoj da fumantoj, kiuj plejparte ne havas la memkonscion deteni sin de fumado en la publikaj lokoj.

La malbona sekvaĵo de fumado estas evidenta. Statistiko montras, ke en Ĉinio ĉiujare mortas ĉ. 750 000 homoj plimalpli pro fumado. La malsanoj rilataj kun fumado, kiaj apopleksio, kormalsano, pulma kancero kaj malsano en la spira kanalo, estas ja grava kaŭzo de morto.

En la lastaj jaroj malpermesi

fumadon al junuloj kaj geknaboj fariĝis ĉefa laboro de la registaro. Nun la laboro jam rikoltis ian sukceson. En 1996 Pekino komencis sanigan kampanjon por nuligi fumadon en 100 lernejoj, iniciatitan de Ĉinio kaj la Monda San-Organizo. La kampanjo jam envicigis 1 000 element-kaj mezlernejojn de Pekino inter la lernejoj sen fumantoj.

Nova raporto de la Monda San-Organizo montras, ke Ĉinio estas la plej granda lando de tabaka produktado, la unua lando de tabaka komercado kun plej grandnombraj fumantoj. Limigi kaj redukti produktadon de tabako jam fariĝis alia ŝlosila punkto de tiu laboro en Ĉinio. La ĉina registaro alprenis 2 rimedojn ĉi-flanke, t.e. en la ĝenerala stato malpermesi reklamojn de cigaredoj kaj praktiki monopolon de vendo de tabakaj produktaĵoj.

PARADIZO DE CENTJARULOJ

Tio estas ĝardeno de longvivuloj, kie oni senpage kuracas ĉinajn centjarulojn. Ĝi, situanta

ĉe monto, havas 8 trietaĝajn loĝdomojn. Ĉiufoje ĝi povas akcepti 368 homojn. La domoj, interkomunikiĝantaj per koridoroj kaj dekoraciitaj laŭ normo de luksaj hoteloj, elspiras naciajn trajtojn ekstere. Tie la maljunuloj povas promeni kaj ĝui la proksimajn pejzaĝojn. Ĉe la domoj estas ĝardeno, placo kaj teatro.

Ĝi situas en amuzejo de la urbo Panyu, Guangdong-provinco.

S-ino Li Sushi estas 107-jara. Akompanate de sia 67-jara filino, ŝi veturis tien de Shaanxi-provinco. En la ĝardeno ŝi vivis 3 monatojn kaj ŝia korpopezo pliiĝis je 4 kg. Tie vivas ankaŭ paro da maljunaj geedzoj de Zhejiang-provinco. Ili geedziĝis antaŭ 81 jaroj. Ili povas legi sen okulvitroj, havas bonan apetiton kaj ŝatas fruktojn. Ĉi-foje ili kunportis kestojn da oranĝoj produktitaj en ilia hejmloko.

La vivo en la ĝardeno estas senĝena kaj enhavoriĉa. Iuj ŝatas kanti, aliaj reciti budhismajn sutrojn, triaj ĝui operojn kaj la ceteraj ludi kartojn kaj maĝangon. Ili ĉiuj havas sian kamaradon en la ĝardeno.

Nutradisto de la ĝardeno diris: "Ĉe ni estas laboranto, kiu respondecas speciale pri aĉeto de manĝaĵoj. Ĉi tie la gemaljunuloj prenas manĝaĵojn 4-foje ĉiutage. Matene ili prenas lakton kaj ovon, kaj je la 8-a kaĉon kaj pasteĉon. Por la tag- kaj vespermanĝoj estas rizo aŭ farunaĵo. Antaŭ kaj post manĝo estas fruktoj kaj aliaj sanprotektaj nutraĵoj."

Centjaruloj en la ĝardeno



Vestoj de tibet-na- ciaj kangba-oj

Fotoj de LIU SIGONG

Karaj legantoj, ekde tiu ĉi numero nia revuo havas novan rubrikon “Vestoj de Ĉinaj Nacioj”.

La vestoj de ĉinaj nacioj brilas ne nur pro sia longa historio, kiu konsistigas gravan parton de la tradicia kulturo de la ĉina nacio, sed ankaŭ pro tio, ke ili montras la kreivon kaj saĝon de la 56 ĉinaj nacioj. Do, pere de la ĉinaj vestoj oni povas koni la historion kaj kulturon de la ĉinaj nacioj en diversaj lokoj, en malsamaj periodoj. Ĝuste pro tio ni starigis tiun novan rubrikon, en kiu ni prezentos vestojn distingiĝajn per trajtoj naciaj kaj lokaj, morojn, estetikon kaj vivon de la rilataj nacioj. Ni esperas, ke la rubriko servos al niaj legantoj kiel fenestro por koni la kulturon kaj socian vivon de la ĉinaj nacioj.

Ĉi tie ni prezentas la vestojn de tibet-naciaj kangba-oj. La tibet-nacianoj vivas plejparte en la Tibeta Aŭtonoma Regiono en okcidenta Ĉinio kaj parte en Qinghai, Yunnan kaj aliaj regionoj. La tibet-naciaj kangba-oj loĝas ĉefe en la Garze-a Tibet-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Sichuan. Iliaj vestoj estas originalaj. Kangba-aj gejunuloj portas belan nacian robon kun brodita zono, precipe surkape ili havas plektaĵojn el haroj kaj ruĝaj silkaj fadenoj.





Fraŭlinoj en tibet-naciaj vestoj



Arĝenta taliorname



Kapornamoj






Tibet-nacia viro en tiaj vestoj



Virino ornamita per kolieroj



Maljunulino simple vestita



Fingringoj kun gemoj



Virinoj feste

Tabuoj en la ĉina lingvo

LA vorto tabuo devenis el Tongo-reĝlando situanta en Polinezio. Kiam la brita navigisto James Cook vizitis la landon en 1777, li trovis, ke tie ekzistas multaj strangaj fenomenoj, ekz., iuj objektoj estas destinitaj nur por la alt-ranguloj, sed ne por la ordinaraj homoj, aŭ nur por iaj specifaj celoj kaj ne por la ĝeneralaj. La tieaj loĝantoj nomas tiajn fenomenojn “tabuo”. Poste, la vorto “tabuo” disvastiĝis tra la mondo.

Fakte, en la lingva kampo, tabuo ja ekzistas preskaŭ en ĉiuj etnoj. En Ĉinio la lingva tabuo jam ekzistis tre longan tempon.

La antikvaj ĉinoj kredis, ke ĉiu homo havas sian propran spiriton kaj personaj nomoj estas kunligitaj kun la spirito de la koncerna persono. Do, ankaŭ nomoj, kiuj fakte estas nur signoj de personoj por faciligi la socian interkomunikadon, fariĝis kodo de la homa spirito. Kaj ankaŭ la ĉinoj havis la superstiĉon, ke la demonoj emas forpreni la homan spiriton por ia celo. Por ili necesas nur voki la nomon de iu homo, kaj se respondos la vokito, lian spiriton tuj forprenos la demono. La ĉina verkisto Lusin skribis, ke dum lia infaneco lia vartistino avertis lin, ke kiam li nokte piediros en sovaĝejo, li neniam returnu



Zhang Qicheng (dekstre)

sian kapon nek respondu, se iu vokos lian nomon, alie lia spirito perdiĝos.

La antikvaj ĉinoj havis ankaŭ tian superstiĉon, ke oni povas fari damaĝon al iu per jena metodo: skribi lian nomon kune kun lia naskiĝdato sur papero kaj trapiki la paperon per tranĉilo aŭ najlo, kaj tiamaniere la damaĝitan homon certe trafos malfeliĉo.

En la antikva Ĉinio imperiestro ĝuis grandan privilegion, lia persona nomo estis plej sankta kaj netuŝebla. Por eviti ĝin, oni eĉ devis ŝanĝi la nomon de forpasinta vaste konata poeto. Kaj la antaŭlonge fiksita geografia nomo estis ŝanĝita nur pro tio, ke ĝi portis la saman aŭ eĉ samsonan vorton kiel la nomo

de imperiestro. Ĉar imperiestro estis simbolo de ŝtato, tia tabuo estis nomata “ŝtata tabuo”. La plej terura afero, kiu rilatis al la ŝtata tabuo, okazis en la periodo de imperiestro Yongzheng de Qing-dinastio (1644-1911). Iu ŝtatoficisto, kiu respondecis pri provinca ekzameno, prezentis ekzamenan temon el kvar ĉinaj ideogramoj. Hazarde, du el la kvar ideogramoj estis tute samaj kiel la senkapigitaj ideogramoj “yong” kaj “zheng”, kiuj formis la titolon de la imperiestro. Kompreneble, la imperiestro furioziĝis, opiniante ke tiu ŝtatoficisto malbenis lin, ke li estu senkapigita. Li ordonis ke la ŝtatoficisto estu enkarcerigita kaj kondamnita al morto.

Tiaj teruraj aferoj multfoje

okazis. Rezulte la antikvaj ŝtato-
 oficistoj kaj verkistoj ĉiam timis
 dum sia skribado kaj tre singlar-
 deme elektis taŭgajn esprimojn,
 por ke la esprimoj el iliaj
 skribaĵoj ne ofendu la kapric-
 ajn kaj suspektemajn imperi-
 estrojn por ne kaŭzi mortpunon.
 Tamen estis mala ekzemplo: la
 imperiestro Pingdi de Han-di-
 nastio (206 a.K. - 200 p.K.) havis
 la originan nomon Jizi. Ĉar “ji”
 signifas grenventumilon, vaste
 uzatan de la tutlanda loĝantaro,
 estis neeble malpermesi la uza-
 don de tiu vorto landskale, sekve,
 tiu imperiestro ŝanĝis sian no-
 mon en alian malofte uzatan
 vorton. Sed tia okazaĵo estis tre
 malofta en la ĉina historio.

En la ĉina lingvo samsonaj
 vortoj tre abundas, kaj troviĝas
 interesaj ekzemploj de tabuoj
 en diversaj fakoj. Ekzemple, por
 la ŝipistoj kaj fiŝkaptistoj la
 vortoj, kiuj sonas “fan” kaj
 “chen”, estis tute malpermesi-
 taj, ĉar la antaŭa havas la signi-
 fon “renversiĝi” kaj la lasta la
 signifon “droni”, memkom-
 preneble, la renversiĝo aŭ dro-
 no de ŝipo estas terura afero por
 tiuj, kiuj perlaboras panon sur
 ŝipo. Estas menciinde, ke la
 nomo “kuai” signifanta manĝ-
 bastonetojn, kiujn ĉiu ĉino uzas
 por manĝado, estis kreita de la
 ŝipistoj por anstataŭigi la origi-
 nan nomon “zhu”, ĉar ĝia sam-
 sona vorto havas la sencon
 “ĉesi”. Al la ŝipistoj la vorto
 “ĉesi” estas malagrabla, do ili
 forigis la originan kaj preferis
 la vorton “kuai”, ĉar tiu vorto
 sonas same kiel la vorto “rapi-
 di”. Signifoplene estas, ke la
 vorto “kuai” ne fariĝis ŝipista
 ĵargono, sed disvastiĝis kiel
 ĉiutaga esprimo de la tuta
 loĝantaro, eble pro tio ke la vorto
 “kuai” sonas pli laŭte kaj klare
 kaj plaĉas al la oreloj kaj ankaŭ
 ĝia samsona vorto “rapidi” al-

logas ĉiujn.

Por la teatra trupo, kiu estis
 organizita de individua aktoro
 en la pasinteco, ĉiu vorto, kiu
 sonas kiel “san”, estis tute mal-
 permesita, ĉar alia vorto, kiu
 havas la saman sonon, signifas
 “disiĝon”, kaj por la teatra trupo,
 disgrupiĝo ja estas fatala. In-
 terese estas, ke la ĉina ekviva-
 lento de la vorto “ombrelo” estas
 “san”, kiu hazarde sonas kiel la
 vorto “disiĝo”, do oni devis ĝin
 eviti kaj ĝin anstataŭigis per la
 esprimo “pluv-ŝirmilo”. Same
 interese estas, ke la vorto “pluv-
 ŝirmilo” estis ne nur uzata de la
 teatra trupo, sed ankaŭ aplikata
 en la Guangdong-a dialekto kaj
 validas ankaŭ hodiaŭ.

Por la homoj, morto estas
 la plej evitinda sed samtempe
 neevitebla afero. Do, same kiel
 en diversaj lingvoj, en la ĉina
 la plej ofte tabua vorto estas
 “morti”. Laŭ esplorado de faku-
 loj, troviĝis pli ol 40 vortoj por
 esprimi la signifon de morto en
 la antikva Ĉinio. La unua kaj
 plej grava estas “beng”, kies
 senco estas “krevi”, kaj tiu vor-
 to estis uzata ekskluzive por la
 morto de imperiestroj. Ĝenerale,
 por eviti la vorton “morti”, oni
 uzas la esprimojn “forlasi la
 mondon”, “eterne dormi”, “ne
 plu ekzisti” k.c.

Aliaj plej evitindaj vortoj
 rilatas al sekso kaj ekskrement-
 tado.

Jam en iu klasika verkaro
 kompilita en la epoko antaŭ Kris-
 to estas aserto ke trinkado,
 manĝado kaj seksa agado ja estas
 gravaj instinktoj de homoj. Tio
 signifas, ke tiuj agadoj estas tute
 naturaj kaj la esprimoj pri ili ne
 estas tabuindaj. Sed oni anko-
 raŭ tabuis la vorton koncerne
 sekson kaj ekskrementadon kaj
 anstataŭigis ilin per diversaj
 esprimoj. Ekz., por sekskuniĝo
 oni havis la strangan kunmeti-

tan vorton “yun-yu”. “Yun” sig-
 nifas nubon kaj “yu” pluvon. La
 kunmetaĵo venis el historia anek-
 doto: la reĝo de regno Chu (722-
 481 a.K.) en sia sonĝo sekse ku-
 niĝis kun iu feino, kiu diris, ke
 ŝi estas nubo ĉe tagiĝo kaj far-
 iĝas pluvo post vesperiĝo. Sekve
 oni ekhavis la kunmetitan vor-
 ton “nubo-pluvo” por eŭfemis-
 me esprimi la seksan agadon.
 Aliaj vortoj tiurilate estas iom
 delikataj: “kune enlitiĝi”, “kune
 enĉambriĝi” kaj “enĉambra afe-
 ro”.


La malpermesitaj vortoj
 koncerne virinajn fiziologiajn
 fenomenojn estas pli multaj ol
 tiuj koncerne la virajn. La
 monataĵo de virinoj estas mal-
 permesita en la parola aŭ skriba
 lingvo. Oni anstataŭigis ĝin per
 “monata okazaĵo” aŭ “monata
 informo” k.s. Eĉ la modernaj
 ĉinaj virinoj emas paroli pri sia
 monataĵo per jenaj esprimoj: “Al
 mi venis la regula libertempo”
 (ĉar virinoj rajtas ripozi dum la
 tagoj de menstruo) aŭ “nun mi
 malfeliĉiĝis”. Kaj en la pasin-
 teco, kiam virinoj gravediĝis,
 oni ĝentile diris, ke “ŝi havas
 feliĉon” aŭ “ŝi patrinigis”.

La ĉina ekvivalento de la
 vorto “necesejo” estas “cesuo”.
 Kiam oni bezonas urini aŭ feki,
 oni ofte diras, ke li volas iri al
 “cesuo”. Troviĝas ankaŭ iom
 stranga esprimo “malligi la
 manojn”. Laŭdire, en antikva
 Ĉinio oni nepre kunligis la
 manojn de krimuloj per ŝnuro,
 kaj kiam la krimulo bezonis iri
 al necesejo, li devis peti la
 gardiston malligi liajn manojn.
 Poste tiu esprimo populariĝis kaj
 estis ĝenerale uzata ĝis nun.

La tabuoj en la ĉina lingvo
 estas vere sennombraj. Estas
 neeble menciigi ĉiujn ĉi tie. Do,
 mi estas devigita kun bedaŭro
 kontribui tiun ĉi mallongan ar-
 tikolon al niaj legantoj. ■



Vendado de marproduktaĵoj



Holoturioj bredataj

DISVOLVI

Fotoj de HUANG LUKUI



Bredado de pektenoj


Inter la Flava Maro kaj Bohai-maro situas Changdao-gubernio, kiu konsistas el 32 insuloj, kun mara areo de 8 700 km² kaj marbordoj longaj je 146 km. Changdao havas kontinentan klimaton de musona orienta Azio. Inluate de la maroj, ĝi estas varmeta en vintro kaj malvarmeta en somero. Pro sia speciala mara klimato ĝi riĉas je maraj produktoj. Estas 200 specoj de konkuloj kaj algoj, inter kiuj pekteno, halio (*Haliotis gigantea*), ekino kaj holoturio famas en kaj ekster Ĉinio. Ĉirkaŭ la insularo

estas nepra vojo de 100 specoj da fiŝoj. La loko abundas je 30 specoj da fiŝoj kun ekonomia valoro kaj ankaŭ estas eksporta bazo de ĉinaj maraj produktoj.

Por sin riĉigi, la insulanoj bredas marajn produktojn, komence laminaron kaj nun ankaŭ pektenojn kaj haliojn. La insulanoj disvolvas marajn kreskaĵojn kaj medikamentojn. Nun ili sukcese elfaris 30 specojn el 5 serioj da medikamentoj kaj sanprotektaj manĝaĵoj kun holoturio, pekteno kaj algoj kiel ĉefaj materialoj.

MARAJN PRODUKTOJN

Bredado de halioj



Teknikistino en esploro pri kresko de haliotidoj



Heroo de provflugigo de aviadilo

LI ne atendis, ke li fariĝos heroo. En 1967 li, junulo el kamparo de Hunan-provinco, aliĝis al armeo. Ĉe la adiaŭo lia patro donis al li unu jupon kaj diris:

“Mia kara, ne forgesu la kamparanojn. Kion ajn vi faros, estu firmvola.”

30 jaroj pasis, la vortoj fariĝis maksimumo por Zou Yanling. Vizaĝe al malfaciloj Zou estas firma.

PROVFLUGIGO DE ĈINA AVIADILO

En 1987 Zou Yanling, kiu respondecis pri kontrolo de aviadita tekniko, forlasis la laboron fruktodonan kaj elektis vojon plenan de danĝeroj kaj defioj. Li fariĝis provisto-piloto de la Shaanxi-a Aviadila Kompanio.

Pri tio li diris: “Antaŭlonge mi jam volis fariĝi provisto-piloto de ĉina aviadilo. Mi flugis 20 jarojn per aviadiloj de 8 tipoj, tamen neniu el ili estis farita de Ĉinio. Mi informiĝis, ke ŝarĝaviadilo Yun-8 estas la plej granda ĉina ŝarĝaviadilo, sed sen provo oni ne povas transdoni ĝin al uzado. Tial mi volas provi.”

La ŝarĝaviadilo Yun-8 C estas esplorita de kelkgeneraciaj inĝenieroj. Por perfektigi, pli frue

funkciigi kaj enmerkatigi ĝin, oni devas fari provadon de serioj da malfacilaj disciplinoj laŭ ĉinaj aviadaj normoj kaj akiri kvalifikigan ateston de la Ĉina Civila Aviada Administracio.

“Provo de staŭla povo” estas nepre plenumenda malfacila disciplino. Ĝi konsistas el tri punktoj: povoj de staŭlo ĉe malgranda tonelaro, granda tonelaro kaj plenŝarĝo. Pro tio la kompanio dungis faman piloton el fremdlanda aviadita kompanio. Li jam provflugis 50 mil horojn. Li sukcese plenumis la disciplinon “staŭlo ĉe malgranda tonelaro”. Lia flugtekniko vekis admiron de ĉinaj pilotoj. Tamen, kiam oni petis lin daŭre provi aliajn du disciplinojn, li rifuzis. Li diris, ke Ĉinio ne havas kondiĉon provi la malfacilajn disciplinojn, kaj foriris kun granda sumo da mono.

Ĉe la foriro li diris al Zou Yanling, ke liaj du kolegoj mortis en provo de tia disciplino. Kiel provisto-piloto, oni devas firme rifuzi, se oni ne havas certecon.

Sed en kunveno de la kompanio Zou Yanling petis: “Ni devas mem provi nian aviadilon. Se alilandanoj kuraĝas flugi, ankaŭ ni kuraĝas; se ili rifuzas flugi, sed ni ne.”

“Staŭlo ĉe granda tonelaro”

certe estas danĝera. Se maltrafo okazas, la aviadilo falos kiel bombo.

Kun maltrankvilo projektistoj plurfoje demandis: “S-ro Zou, kiom certa vi estas?” Zou Yanling respondis: “60%. Tio sufiĉas.”

En tiuj antaŭprovaj tagoj li kaj projektistoj kune analizis teorion pri staŭlo, serĉis eĉ malgrandajn diferencojn de ĉiuj provoj pri staŭlo ĉe alilandaj aviadiloj kaj pensis pri eventuala danĝero.

En la ĉielo 6 000 metrojn alta Zou Yanling veturigis ŝarĝaviadilon Yun-8 C, kiu pezas je 61 tunoj, sur la flugkampoj staris fajroaŭtoj kaj ambulancoj, oni atendis.

Li sukcese finis provojn pri staŭlo ĉe patrolado kaj ekflugo, kaj ekprovis staŭlon ĉe surteriĝo, kiu estas plej malfacila. La surteriĝa aparato jam lokiĝis kaj la planeoj turniĝis al 35°. Zou Yanling atentigis la aviadistan grupon: la aviadilo ekmalrapidis.

Kiam la rapido atingis 170 km ĉiuhore, la aviadilo ekstremsis. La rapido jam estis ĉe provfluga limo por samspeca aviadilo de alia lando. Tamen Zou Yanling rimarkis, ke la aviadilo povas esti pli malrapida. En for-



Zou Yanling antaŭ provflugigo

ta tremo la aviadilo plimalrapidis, dum danĝero kreskis. Kiam la rapido estis 159 km ĉiuhore, la aviadilo eniris en la limon de perdo de rapideco. Tiam kun kapo tuj malsupren la aviadilo sin turnis maldekstren kaj estis falanta. Se en 12 sekundoj oni ne povas ŝanĝi tion, estos fatalo. Zou Yanling, retenante la spiradon, rapide premis la stirstangon kaj akcelilon, kaj la aviadilo denove flugis stabile.

PROVFLUGIGO BEZONAS TEKNIKON

Zou Yanling scias, ke krom alta tekniko, elstara provisto-piloto devas posedi ankaŭ fundamentan teorion, ne nur respondecon por sekuro de aviadilo, sed ankaŭ spiriton defii alteknikon. Pro tio li senĉese studas. Lia studemo ne nur vekis admiron de ĉinaj teknikistoj, sed ankaŭ estimon de alilandaj pilotoj.

Foje Zou Yanling laŭ sia pro-

pra sperto elmetis originalan argumenton. La rezulto de provflugigo estis tute sama kiel ĉe la argumento.

Por klare koni iun movon, Zou Yanling modeste lernis de la supre menciita alilanda piloto. Lia studemo emociis tiun piloton. Post kelkaj jaroj, kiam la piloto refoje vizitis Ĉinion, li eksciis, ke Zou Yanling jam refoje provis ĉiujn disciplinojn, kiujn li jam provis en Ĉinio, kaj korektis 3 el liaj 5 konkludoj.

“S-ro Zou, vi estas tre kapabla, mi volas amikiĝi kun vi!” li diris kun starigita dikfingro.

DEFII “HALTIGON EN LA AERO”

“Haltigo kaj restartigo de motoro en la aero” estas plej danĝera disciplino. La proceso estas: kiam la aviadilo flugas en la aero, oni haltigas unu motoron kaj restartigas ĝin post 3 minutoj. Oni nomas tiun disciplinon “tabuo de flugado”. Iu ĉina provisto mortis en provado de tiu disciplino.

Tamen Zou Yanling volis provi. Tiun tagon, post kiam verda signal-lumo brilis en la aero, la aviadilo de Zou Yanling ekflugis. Kiam ĝi atingis lokon 4 000 metrojn altan, li ordonis haltigi la motoron, la maŝinisto haltigis la dekstran motoron n-ro 4, kaj la aviadilo daŭre flugis per la aliaj 3 motoroj.


La motoro devas halti por 3 minutoj kaj refoje starti post kompleta malvarmiĝo. Se oni malsukcesus restartigi la motoron n-ro 4, ĝi produktus 2 000-6 000 kg. da negativa tirforto, tiam la aviadilo estus en stato de “ventmuelado” kaj falus spirale. Tio estas tre danĝera. 3 malfacilaj minutoj pasis, Zou Yanling ordonis: “Startigu”, kaj 4 aviadistoj finis 21 movojn en dekelkaj sekundoj. Aŭdiĝis bruego, kaj la starto sukcesis! ■

Montgrimpado de

Teksto kaj fotoj de HAN HONG

Taishan-monto en Shandong-provinco estas fama pitoreskejo en Ĉinio. Jam de la antikveco ĉinoj ŝatas surgrimpi ĝin por sin ekzerci kaj rigardi sunleviĝon.

Ĝi estas sufiĉe alta por la sanaj homoj, kaj surgrimpi ĝin estas neimageble por paralizitoj. Ĉi-jare en aprilo, ĉ. 800 iamaj paralizuloj, kiuj resaniĝis dank' al la tradicia ĉina medicino, aliĝis al la "Internacia Tago de Grimpado sur Taishan-



Supren al la montsupro



94-jara, ŝi ne estas postrestinta.



antaŭaj paralizitoj

monto". Ili venis el Usono, Japanio, Taiwan kaj iuj aliaj lokoj de Ĉinio. Inter ili troviĝis 94-jara maljunulino kaj 20-jara junulo. Sen rulseĝo kaj bastono ili brave surgrimpis la monton.

La grimpadon aranĝis Kultur-interŝanĝa Societo de Ĉinaj Maljunuloj kaj Siwei-Kompanio de Shandong. Jam 3-foje okazis la Internacia Tago de Taishan-Grimpado, kiun partoprenis ĉ. 3 000 iamaj paralizuloj.





Subskribado por memoro



Ekgrimpado sur Taishan-monto

Intervjuo sur la montsupro

Ĉe la monttalo



La ĉielo en la okuloj de

de PANG BIAN

ANTIKVAJ ĉinoj opiniis, ke sur la ĉielo la plej grandaj estas la suno kaj luno. Pro tio ili donis grandan atenton unue al la suno kaj luno kaj poste al la steloj.

SUNO

Samkiel alilandanoj, ankaŭ la ĉinoj kultis la sunon en la antikveco. Ili ne sciis, de kie venis la brila suno. Ili rememoris Fuxi kaj Nüwa, la kreintojn de la homoj. Ili imagis, ke Fuxi kaj Nüwa iam estis unu sama dio nomata Xihe, kiu estis patrino de la suno. Xihe vivis en valo kun termofonto en la orienta ekstremo. Ŝi naskis 10 sunojn. Ĉe la fonto estis morusarbo. Ĉiumatene la suno, kiu tranoktis sur la arbobranĉo, flugis al la ĉielo rajdante sur ruĝa korvo kaj verŝis lumon kaj varmon sur la homan mondon. Kiam ĝi finis sian vojaĝon en la ĉielo kaj revenis al la fonto, la patrino sendis alian sunon al la ĉielo, tiamaniere la homoj eniris en novan tagon... Pro tio la antikvuloj nomis la sunon ankaŭ suna korvo. Sur silkaj pentraĵoj, koloraj argilaĵoj kaj brikoj el antikvaj tomboj vidiĝas bildoj pri la suno portata de ruĝa korvo. Sed efektive sur la ĉielo estas nur unu suno. Kun profundigo de la homaj scioj naskiĝis nova mito: En la antikveco ardis 10 sunoj, kiuj roŝtis la vegetalojn, kaj la homoj ne havis manĝaĵojn. La reganto petis lertan pafiston paffaligi 9 sunojn, dank' al tio prosperiĝis la vegetaloj...

Fakte la mito de 10 sunoj ne estas absurda. Modernaj astronomoj diris, ke sub certaj kondiĉoj unu suna haloo povas kaŭzi 10

sunojn iluziajn. En historia libro verkita antaŭ 2 500 jaroj legiĝas noto pri tia mirakla astronomia vidaĵo. En la Orienta Han-dinastio (25-220) filozofo Wang Chong faris tezon pri la mito de 10 sunoj kaj konkludis, ke la superflujaj sunoj ne estas veraj. Koncerne la ruĝan korvon en la mito, modernaj sciencistoj opinias, ke tio eble estas iluzio kaŭzita de la sunaj makuloj. Antikvuloj vidis la makulojn, tamen ne sciis, kio ili estas. Ili faris nur noton kaj bildon pri ili, kiuj similas al monero, ovo, homo aŭ birdo.

Iuj partoj de la mito konserviĝis kaj hodiaŭ la ĉinoj daŭre nomas Morusujo Japanion, la ekstrem-orientan landon de la mondo, kaj en la ĉina lingvo Japanio signifas lokon de sunleviĝo. Xihe estas kultata kiel apolono. Poste en Ĉinio la oficistoj, kiuj okupiĝis speciale pri observado de la suno, estis nomataj ankaŭ Xihe.

En la okuloj de la antikvaj ĉinoj suna eklipso aŭguras malbonon. Antaŭ Han-dinastio (206 a.K. - 220 p.K.) estis observata regulo savi la sunon. Kiam la suno ŝanĝiĝis en formo, oni tuj sin direktis al la kultejo por bati tamburojn kaj buĉi ŝafojn por savi la sunon. Ĉinaj imperiestroj tre atentis observadon kaj registradon de suna eklipso. En la ĉina historio oni faris noton pri suna eklipso 1 124 fojojn, el kiuj la unua okazis en 2165 a.K. Tiufoje Xihe, oficisto pri observado de suna eklipso, ne ĝustatempe raportis tion al la superulo pro drinko kaj estis mortigita. En Shang-dinastio (17 jc. - 11 jc a.K.) Xihe ĝuste prognozis sunan eklipson. Tiam

por savi la sunon oni mortigis 9 bovojn en la kulta ceremonio. Filozofo Xunzi en la periodo Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) diris: "Suna kaj luna eklipsoj estas natura fenomeno. Ili ne estas timindaj." Liu Xiang, erudiciulo de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. - 25 p.K.), diris, ke suna eklipso estas kaŭzita de ŝirmo far la luno, kaj montris, ke suna eklipso okazas laŭ periodo.

Jam antaŭ 3 000 jaroj ĉinoj sciis utiligi sunenergion. Ili inventis fajrilon *jangsuj*, t.e. brillan konkavan objekton, kiu fajrigas per fokusigo de sunradioj. Wang Chong diris: "La suno ja estas ĉiela fajro, kiu ne diferencas de la tera fajro."

LUNO

Antikvaj ĉinoj sciis ne nur fari fajron pere de sunlumo, sed ankaŭ akiri akvon pere de la luno. Ili frotis bronzan spegulon aŭ konkron ĝis varmiĝo kaj metis ĝin sub la lunon, poste aperis akveroj sur la spegulo aŭ konkro. Krome, ili sciis ankaŭ ke lunfazoj havas evidentan influon sur la akvaj kreskaĵoj, kaj dum plenluno la konkuloj estas karnoriĉaj. La antikvaj ĉinaj filozofoj formis teorion pri *jin* kaj *jang* ĝuste en observo kaj pripenso de la universo. La tiel nomata *jang* estas la flanko rigardanta al la suno, dum *jin* montras la flankon kun dorso al la suno. Poste pensuloj klarigis la naturajn kaj sociajn fenomenojn per tiu koncepto kaj konkludis, ke la tuta universo entenas la du flankojn, t.e. *jin* kaj *jang*, kiuj estas entenataj unu en la alia. Laŭ tiu teorio la ĉielo estas *jang*, dum la tero *jin*, la suno *jang*

antikvaj ĉinoj (II)

kaj la luno *jin*, la fajro *jang* kaj la akvo *jin*. Tiurilate oni konkludis, ke la suno estas origino de *jang*, dum la luno tiu de *jin*.

La plej bona atesto pri tio, ke la luno estas origino de *jin*, estas la rilato inter fluso kaj la luno. Ĉe la rivero Qiantang, kiu fluas en la Orientan Ĉinan Maron, okazas impona tajdo la 18-an de la oka monato ĉiujare laŭ lun-kalendaro. Wang Chong, kiu vivis en la unua jarcento, diris: "La tajdo strikte rilatas al lunfazoj." Li opiniis, ke la grandiozeco de la tajdo ĉe la rivero Qiantang havas rilaton ne nur kun la luno, sed ankaŭ kun la topografio, ĉar tie la enmariĝo estas mallarĝa kaj fundo malprofunda, tial ĉe la mara fluso la akvo leviĝas alten kaj kuras furioze.

Ankaŭ la luna eklipso estas teruro por antikvaj ĉinoj. Ili opiniis, ke tio montras, ke la ĉiela hundo manĝas la lunon. Antaŭ 2200 jaroj en Ĉinio aperis astronomia verko *Zhou Bi Suan Jing*, kiu ne nur per la teoremo de Pitagoro kalkulas la diametron de la suno kaj la distancon inter la tero kaj la suno, sed ankaŭ montras, ke la luno fakte ne lumas. En ĝi legiĝas la vortoj: "La suno prilumas la lunon, pro tio ankaŭ la luno lumas." Sciencisto de la Orienta Han-dinastio Zhang Heng (78-139) bone montris la kaŭzon de luna eklipso: La lunlumo estas kaŭzita de la suna prilumado, tial kiam la tero estas inter la suno kaj luno, ĝi do ŝirmas la sunlumon kaj okazas luna eklipso.

Koncerne la ombrojn en la luno, laŭ ĉinaj mitoj, tio estas osmantarbo (*Osmanthus*) kaj jada leporo. Poste oni opiniis, ke tio estas tera ombro. Estis ankaŭ la

tria diro: La ombroj estas kaŭzitaj de la suno, kiam ĝi prilumas la konveksajn lokojn.

STELOJ

Jam antaŭ tre longe ĉinoj konis la Polusan Stelon. Antaŭ 2500 jaroj, kiam Konfuceo pri-traktis regadon, li diris: "Se oni regas morale, oni, simile al la Polusa Stelo, estas ĉirkaŭita de aliaj steloj." Li komparis la regadon per situo de la Polusa Stelo, kiu estas meze de la steloj, kaj klarigis, ke la popolo subtenas nur la moralan reganton. Tiam la ĉinoj opiniis, ke la Polusa Stelo, kiu situas meze de la ĉielo, estas senmova.

De la 5-a ĝis la 12-a jc. tia kono estis iom post iom neglektata. Shen Kuo (1031-1095), sciencisto de la Norda Song-dinastio, faris observadon al la Polusa Stelo per longa tubo, sed post momento li trovis, ke la stelo moviĝis ekster la tubon. Kiom longe do la Polusa Stelo estas for de la mezo de la ĉielo? Pri tio oni havis malsamajn notojn de la observado: En 100 p.K. oni trovis, ke tio estas 0° , en 502 — 1.6° , en 730 — 2.5° , en 1074 — 3.9° kaj en 1144 — 4.2° . Moderna astronomio montras, ke la terglobo ne estas ronda pro malekvilibro de la altiraj fortoj far la suno, luno kaj aliaj planedoj al la terglobo; en la homaj okuloj la situo de la Polusa Stelo senĉese moviĝas, pro tio oni povas diri, ke la observoj de antikvaj ĉinoj estas fundamente korektaj, kio donis valorajn datenojn al la moderna astronomio en la observado.

Pro la teorio pri unueco de la ĉielo kaj homaro, antikvaj ĉinoj rigardis la Polusan Stelon ĉiela

imperiestro kaj la 7 stelojn de la Granda Ursino liaj ĉaroj. Ili diris, ke la ĉiela imperiestro inspektas la ĉielon veturante per la ĉaroj kaj ankaŭ regas la kvar sezonojn de la homa mondo.

Venuso, Jupitero, Merkuro, Marso kaj Saturno estis multe atentataj de la antikvaj ĉinoj. Ili trovis, ke tiuj kvin planedoj moviĝas en la direkto kontraŭ la astrarivoluo kaj proksimiĝas ne nur tiuj planedoj al la suno, sed ankaŭ ili mem en la certa tempo proksimiĝas unu al alia.

En Ĉinio alfa-stelo de Karenio estas nomata ankaŭ Stelo de Maljunuloj. Ĝi estas malfacile videbla en multaj lokoj. La antikvaj ĉinoj opiniis, ke apero de alfa-stelo de Karenio montras la tutmondan pacon, kaj pro tio ili preĝis al ĝi por longa vivo kaj feliĉo.

La antikvaj ĉinoj malŝatis la kometojn, opiniante, ke ili estas kaŭzitaj de la ŝtata ĥaoso, tial la astronomiaj oficistoj ĉiam donis grandan atenton al observado kaj registrado de kometoj. Ili neniam preteratentis la Halejan Kometon, kiu estas vidata post ĉiu 76-a jaro. De la jaro 613 a.K. ĝis la komenco de la 20-a jc. ĉinoj faris 31 notojn pri la Haleja Kometo. En la 70-aj jaroj de la kuranta jarcento en Hunan-provinco oni elterigis silkan libron pri kometoj eldonitan en la periodo Militantaj Regnoj. En ĝi estas 29 bildoj de kometoj, kun 1-4 vosto. Evidente, tio ne estas farita de unu generacio da astronomoj. Ĉinaj arkeologoj plurfoje trovis en ruinoj de Shang-dinastio kaj Zhou-dinastio (11-a jc. - 256 a.K.) armilojn kaj ritilojn el meteorfero. ■

PRI ĈINAJ NOMOJ

de WANG HANPING

Dum longa tempo mi cerbumis pri la uzo de ĉinaj nomoj, ĉar ili ŝajnas al mi esti uzataj alimaniere ol en mia lando. Cetere mi rimarkis, ke la kutimoj varias en multaj landoj de la mondo.

HERMAN THEOBALD (Svedio)

ĈINIO estas lando multnacia. Ĝiaj hanoj, hujoj kaj manĉuroj uzas la hanlingvon kaj ĉiuj ĝiaj aliaj nacioj uzas sian propran lingvon. Tiuj lingvoj apartenas al malsamaj familioj. Pro malsameco de la historio kaj kulturo tiuj nacioj havas diferencon ankaŭ en la homaj nomoj, ekz. la tibetanoj havas la personan nomon, sed ne la familian. Tiel statas ankaŭ aliaj 10 naciminoritatoj. En Ĉinio la nomoj de jioj kaj aliaj 20 naciminoritatoj, el kiuj iuj havas la familian nomon kaj aliaj ne, konsistas el pluraj partoj. Ankaŭ la nacioj, kiuj uzas la hanlingvon, havas siajn proprajn trajtojn ĉiflanke. La ĉinaj nomoj estas multformaj kaj enhavoriĉaj. En ĉi artikolo mi traktu la naskiĝon, ŝanĝiĝon kaj uzadon de la ĉinaj nomoj por respondi la demandojn de s-ro Herman Theobald.

Kontraŭe al la kutimo de la okcidentanoj, la ĉinoj metas la familian nomon antaŭen kaj la personan posten, ĉar en Ĉinio la familiaj nomoj naskiĝis pli frue ol la personaj, kaj plie, la antaŭaj havas apartan signifon en

la homa koncepto. En la patriarka klana socio de Ĉinio la familia pozicio kaj sang-rilato estis bazo por distingi la interrilatojn de la homoj kaj ĉiflanke la familia nomo estis la plej grava marko. La ĉinoj rigardis generadon la plej granda afero en ilia vivo kaj tiun ĉi taskon devis plenumi viroj ekskluzive, tial la ĉinoj ĉiam portas la familian nomon de sia patro.

La historio de familia nomo en Ĉinio komenciĝis antaŭ 5 000 jaroj. Oni uzis pli ol 6 000 familiajn nomojn. Iuj devenis de la landnomoj Zhou, Chen, Wu, Lu, Song kaj Zheng; aliaj de oficoj kaj rangoj, kiaj Sima (ŝtatoficisto de milita afero), Wang (reĝo) kaj Hou (markizo); triaj de loknomoj, kia Guo (urbomuro); kvaraj de profesioj de la antaŭuloj, kia Tao (ceramikisto). Kompreneble, estis ankaŭ aliaj devenoj, kiuj havis striktan rilaton kun la pozicio kaj rango de la antaŭuloj. Iuj el ili poste potenciĝis, dum la aliaj dekadencis.

Nun la ĉinoj portas ĉ. 3 000 familiajn nomojn entute kaj el ili ofte uzataj estas ĉ. 500, el kiuj la

plejparto estas unu-ideogramaj kaj nur tre malmultaj du-ideogramaj, kiaj Sima kaj Ouyang. El tiuj familiaj nomoj la unuaj tri estas Zhang, Wang kaj Li, ĉiu kun pli ol 80 000 000 portantoj. Post ili sekvas la familiaj nomoj Liu, Chen, Yang, Zhao, Huang, Zhou, Wu, Xu, Sun, Hu, Zhu, Gao, Lin, He, Guo kaj Ma. Pli ol duono de la ĉinoj portas tiujn 19 familiajn nomojn.

La ĉinoj alte taksas la familian nomon kaj pro tio formiĝis rigora sistemo. Tamen kun epoka progreso ŝanĝiĝis la homa koncepto. Nun kvankam la homoj daŭre portas la familian nomon de la patro, tamen tio ne montras noblecon nek malnoblecon. Ankaŭ paliĝis la patriarka klana koncepto. Nuntempe aprobite de siaj gepatroj, oni povas porti ankaŭ la familian nomon de la patrino. Tio estis tute neebbla antaŭ duonjarcento.

En Ĉinio estas miloj da familiaj nomoj en la han-lingvo, tamen la nombro de la han-lingvaj fonem-kombinoj superas nur iom pli ol 400. Pro tio multaj familiaj nomoj de la hanoj estas homo-

fonoj. Tiel statas ankaŭ iuj personaj nomoj. Pro tio, ĉe la konatiĝo oni devas klarigi, kiu ideogramo montras la familian nomon.

En la feŭda socio, pro malalta socia pozicio, ĉinaj virinoj ne havis sian personan nomon, tial ili portis nur la familian nomon de la patro kaj post edziniĝo ankaŭ tiun de la edzo, kaj tiam ili metis la familian nomon de la edzo antaŭen kaj tiun de la patro malantaŭen. Sed nun ĉiuj virinoj havas sian propran nomon, kiu ne ŝanĝiĝas post la edziniĝo.

Familia nomo estas tre grava, dum la persona estas en dependeco. Antaŭe la nomoj de ĉinoj estis pli komplikaj ol tiuj de la nunaj. Iuj ĉinoj havis plurajn nomojn, tamen el ili plej gravis persona kaj adoltiĝa, signife interligitaj. Kutime, la gepatroj, ĉefe la patro, donis infanan kaj personan nomojn al la bebo 3 monatojn post ĝia naskiĝo. En iuj lokoj oni ankaŭ petis la avon doni tiajn nomojn al la nep(in)o. Ĝenerale dirite, la tiel nomata persona nomo estas oficiala, kiu rolas en la tuta homa vivo. Kaj la infana nomo estis uzata inter la familianoj, parencoj kaj intimaj amikoj. Ĝi ne plu estis uzata, post kiam oni atingis adoltiĝon. La infana nomo estas familiara kaj vulgara, dum la persona estas ĝentila kaj serioza. Antaŭe, kiam la homoj atingis la aĝon de 20 jaroj, ili donis al si adoltiĝan nomon. Kaj la uzado de persona kaj adoltiĝa nomoj estis ja malsama. La persona estis donita de la gepatroj, tial la gepatroj, geavoj kaj aliaj supergeneraciuloj vokis per ĝi, kaj la nom-portantoj nomis sin mem ankaŭ per ĝi, dum la samgeneraciuloj, posteuloj kaj tiuj, kies pozicio estis malalta, devis voki per la adoltiĝa por montri respekton. Ekz. la persona nomo de Konfuceo estis Qiu kaj lia adoltiĝa — Zhongni. Liaj disĉiploj

nomis lin per Zhongni.

La sistemo de persona kaj adoltiĝa nomoj daŭris ĝis 1949. Nun iuj maljunuloj havas adoltiĝan nomon, sed la mezaĝuloj kaj junuloj ne. Nuntempe persona nomo jam identiĝis kun la adoltiĝa. La modernaj homoj uzas la nomon tute liberigite el la antaŭaj tabuoj. Kompreneble, estas ne dece rekte voki la gepatrojn kaj aliajn supergeneraciulojn per ilia persona nomo. Ĝenerale, oni vokas siajn konatojn per la familia nomo kun *lao* (por pli-olmezaĝa) aŭ *xiao* (por juna) antaŭe, tute sen la persona nomo, kio montras intimecon kaj ankaŭ respekton.

En la patriarka klana socio estis observataj multaj reguloj de nomado, krom la supre menciitaj, estas ankaŭ grava regulo, t.e. unu sama ideogramo estas uzata en la persona nomo de la samgeneraciuloj de la sama klano. Tio vidiĝas en la nomoj de iuj junuloj kaj multaj mezaĝuloj. Mia nomo estas Wang Hanping. Ankaŭ la dua ideogramo de la nomoj de miaj gefratoj estas han. Tamen tio vidiĝas nur en la nomoj de la membroj de sama familio kaj tiu regulo jam paliĝas kaj iom post iom ne validas.

La homaj nomoj ŝanĝiĝas kun tempopaso. La uzado de unu-ideograma persona nomo multe kreskis en la lastaj 20-30 jaroj. Tio estas utila por simpligi la nomojn, tamen tio multe pliigis la nombron de tiuj, kiuj havas unu saman nomon.

Estas klara diferenco inter la nomoj de la viroj kaj virinoj. La nomoj de viroj montras bravecon, firmecon kaj altan aspiron, signifante land-prosperigon, monton, riveron, sanktulon kaj heroon, dum tiuj de virinoj montras belecon kaj tenerecon kun la signifo de juveloj, herboj, floroj, birdoj, virtoj k.a. En la viraj nomoj oni ofte uzas la ideogramojn prononcatajn kiel *ming* (brilo), *guo* (lan-

do), *de* (virto), *dong* (oriento), *guang* (lumo) ktp., dum en la virinaj ofte vidiĝas la ideogramoj prononcataj kiel *xiu* (beleco), *yu* (jado), *fang* (ĉarmo), *mei* (umeo), *chun* (printempo) ktp. El tiuj ideogramoj oni povas faris multajn vortkombinojn, kiaj *jianguo* (landokonstruo), *xiuying* (bela floro) k.a. Laŭ la nomoj oni povas scii, ĉu tio montras viron aŭ virinon. Kompreneble, troviĝas virinaj nomoj, kiujn uzas ankaŭ viroj aŭ inverse.

Hodiaŭ, kvankam la tradiciaj kutimoj ludas ian rolon, tamen en nomado oni jam liberigis sin el la kateno de rutinaj reguloj kaj la nomoj multe simpliĝis. Ĉiu homo uzas nur unu nomon kaj lia infana nomo estas unu ideogramo citita el la oficiala nomo, kun *xiao* aŭ *a* antaŭe por esprimi intimecon.

Nun la supre diritaj ideogramoj estas jam malmulte uzataj en nomado de la infanoj, naskiĝintaj en la 90-aj jaroj. Junaj gepatroj fosas en vortaro aŭ serĉas klasikaĵojn, por ke la nomo de ilia infano konsistu el bonaŭguraj kaj belsonaj vortoj.


Jen nomoj de miaj kolegoj, kiuj ofte aperas en nia revuo “El Popola Ĉinio”, ekz. Li Liang, Shumei, Pang Naiying kaj Zheng Zhenjie. Por la nomo Li Liang, *Li* estas lia familia nomo. Li naskiĝis en Liang-monto, Yunnan-provinco, tial li prenis la nomon de sia naskiĝloko kiel sian personan nomon. Shumei estas virina nomo ofte uzata de hanoj. Ĝi estas ankaŭ plumnomo de mia kolegino Song Shumei. Pang Naiying estas alia redaktorino. *Pang* estas malofte uzata familia nomo kaj *naiying* estas ofte uzata virina nomo. Por la nomo Zheng Zhenjie, *Zheng* estas familia nomo, lia persona nomo konsistas el du ideogramoj *zhen* kaj *jie*, kiuj estas ofte uzataj de viroj, tamen *jie* estas uzata ankaŭ por virina nomo. ■

Lertaj metiistoj de *huĉin-o*

Teksto kaj fotoj de ZHAO XI



Agordado de kordoj



Serpenta haŭto nemankigebla por *huĉin*-farado



Huĉin-farado instruata





Shi Zhixian



En farejo de *huqin*-oj

Estas malgranda korto en suda Pekino. Sur ĝia lintelo brilas oraj ideogramoj kun la signifo “*Huqin*-a Societo Shi Shanpeng”. Tio estas familio de tri-generaciaj *huqin*-istoj.

La societo estis fondita antaŭ 80 jaroj. Ĝi faris 4 *huqin*-ojn famajn en la tuta opera rondo, kiuj akompanis la eminentajn pekin-operistojn Mei Lanfang, Cheng Yanqiu, Xun Huisheng kaj Shang Xiaoyun en ilia brila artistika vivo. Nun tiuj kord-instrumentoj estas konservataj en teatro de Pekino. Majstro de *huqin*-farado Shi Shanpeng forpasis antaŭ longe. Lia filo Shi Zhixian heredis la metiarton.

Kord-instrumentoj multe diferencas inter si. La *huqin*-oj faritaj de la societo estas aparte distingigaj. Ili, el bambuaj tubo kaj kano kaj el serpenta haŭto, estas faritaj per eminenta metio. La bambua tubo kiel sonkesto estas rigore elektita, zorgeme polurita kaj borita. La bambua arĉo estas kurbigita super fajro el karboforno. Antaŭe preskaŭ ĉiuj familioj en Pekino havis karboforon, sed nun ili uzas gason, tamen la societo de Shi daŭre uzas karboforon ĝuste por kurbigi la arĉojn super la fajro.

Kvankam la *huqin*-oj estis preparitaj, tamen oni ne vendis ilin tuj. Antaŭe, majstro Shi ĉiam zorgeme agordis la kordojn, por ke ĉi tiuj sonu konforme al la malsamaj voĉoj kaj trajtoj de la majstroj de la pekina opero. S-ro Shi Zhixian bone konas la valoron de la marko “Shi-familia *Huqin*-o”. La kord-instrumentoj faritaj de la societo ne povas esti enmerkigitaj sen lia agordado. Li diris: “Nun *huqin*-oj ne multe profitigas, tamen la metio kaj famo de nia familio ne povas esti ignoritaj. Se troviĝos preferantoj de *huqin*-o, mi do heredigis la metion.” Nun Shi Yousheng, lia 34-jara filo, heredis lian arton. Li diris, ke, kvankam *huqin*-o valoras malpli ol katokulo kaj brilanto, tamen ĝia muziko neniel perdiĝos. Nun en la metiejo kun areo de dekelkaj kvadrataj metroj pendas multaj *huqin*-oj, kiuj estas rigardataj ne nur kiel ordinara muzikiloj, sed ankaŭ kiel simbolo de kulturo kaj historio.

Ĉinio penadas por historia datado

ĈINIO estas unu el la malmultaj, plej frue civilizitaj landoj kun sendependa origino, tamen dokumentoj konigas, ke la plej frua registrita ĉina historio datiĝis nur de 841 a.K., kiam estis sur trono reĝo


Ji Hu de la Okcidenta Zhou-dinastio. Tamen, oni ne scias la precizan fondtempo de Xia, la unua dinastio de Ĉinio (fondita fine de la 22-a jc. a.K.), Shang, la dua dinastio (fondita komence de la 17-a jc. a.K.) kaj la frua periodo de la dinastio Zhou (fondita en la 11-a jc. a.K.). Kio do atestas la 5 000-jaran historion, pro kiu fieras la ĉinoj? Maje de 1996 komenciĝis la projekto "Datado de la dinastioj Xia, Shang kaj Zhou", kiu liveros precizan historion pri la regperiodo de tiuj tri dinastioj.

ELIRI EL LA NEBULO

Konfuceo, kiu vivis antaŭ pli ol 2 400 jaroj, diris: "Mi povas diri ritojn de la dinastioj Xia kaj Shang, tamen mi ne scias la detalojn." Tio okazis pro malsufiĉeco da historiaj materialoj. Fakte, Konfuceo vivis ĉ. 500 jarojn post pereado de Shang-dinastio. Kaj plie, en la jaro 213 a.K. la Unua Imperiestro de Qin-dinastio ordonis forbruligi multege da libroj, pro kio la historio de Xia kaj Shang fariĝis pli malklara.

Post la Nov-kultura Movado de la Kvara de Majo 1919, en la ĉina historiista rondo naskiĝis pensfluo pri suspekto de la antikveco. Iuj opiniis, ke la tradiciaj konceptoj pri la historia epoko de Pan Gu, kiu apartigis la ĉielon disde la tero, kaj pri la Tri Antaŭhistoriaj Imperiestroj kaj Kvin Famaj Tribestroj venis el absurda mito kaj en la antikva historio multaj epizodoj estis imagitaj de homoj pro ties politika bezono. Ili eĉ opiniis, ke la ĉina historio komenciĝis de la Orienta Zhou-dinastio (770-256 a.K.). Laŭ ilia opinio la ĉina historio estis duone mallongigita. En pluraj okcidentaj historiaj verkoj Ĉinio estas rigardata kiel la lasta el la kvar civilizitaj landoj de la mondo.

En la 20-a jc. la ĉina arkeologio atingis grandajn sukcesojn. Dank' al tio, la historio de la dinastioj Xia, Shang kaj Zhou eliris el nebulo. En la lastaj jaroj de la 19-a jc. kamparanoj de la urbo Anyang, Henan-provinco, elterigis "drakan ostojn", orakolan ostojn, kiu faris sensacion en la tuta mondo. Valoraj skribaĵoj sur la orakolaj ostoj konigas la brilan historion de la lasta periodo de Shang-dinastio kaj faris kredindaj la notojn en historiaj verkoj. En 1928 oni faris grandskalan arkeologian prifosadon en la ruino de Shang-dinastio en Anyang. De tiam estis elterigitaj pli kaj pli multe da historiaj objektoj de la dinastioj Xia, Shang kaj Zhou. Pro tio la nunaj homoj estas multe pli memfidaj ol Konfuceo pri la historio de la tri dinastioj. Kvankam ĉinaj arkeologoj faris grandiozajn malkovrojn, kia la Terakota Legio ĉe la Maŭzo-



Bronza tripieda kuirvazo de Shang-dinastio, elterigita en Anyang de Henan-provinco

leo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, tamen la plej grava rikolto estas historiaj objektoj de la dinastioj, sed bedaŭrinde, eĉ hodiaŭ oni ne scias la precizajn jarojn de tiuj tri dinastioj. Ĉu en la fruaj historiaj verkoj, ĉu en la muzeoj, ne estas notoj tre gravaj por la historia studo.

KUNE LABORAS PLUR-FAKAJ SCIENCISTOJ


Ja estas malfacile science konigi la historion de la dinastioj Xia, Shang kaj Zhou, kiuj ekzistis antaŭ 3 000-4 000 jaroj. Fakuloj iam deziris fari kronologian tabelon de la dinastioj Shang kaj Zhou surbaze de la skribaĵoj sur orakolaj ostoj, bronzaĵoj kaj aliaj historiaj dokumentoj kaj el astronomiaj kaj kronologiaj vidpunktoj por difini la precizajn regperiodojn de la tiamaj reĝoj. Ilia laboro atingis ian sukceson, tamen tio estas ankoraŭ tre malproksima de la solvo de la historia datado. La disvolviĝo de la moderna arkeologio malfermis novan vojon por studi la civilizacion de la tri dinastioj.

“Datado de la dinastioj Xia, Shang kaj Zhou” bezonas sciencojn de pluraj fakoj, kiaj historio, arkeologio kaj astronomio. Ĉinaj fakuloj kune esploras por doni ĝustan konkludon de tiu problemo.

Oni prenis ĉefe datadon per karbono 14, kies precizeco estas ± 20 jaroj, kaj plie, ĉiuj datenoj de la datitaj jaroj kaj konkludoj devas, en la ĝeneralaj trajtoj, konformi al la konkludoj faritaj de la sciencistoj kaj iuj gravaj problemoj — al la komuna kono de la historiistoj.

GRAVAJ ATINGOJ

Se oni rigardas la kronologian tabelon kiel urbomuron, do oni povas ripari ĝin laŭ ties ĉefaj turnopunktoj. Estas ĝojige, ke la ŝlosilaj punktoj por datado de la dinastioj Xia, Shang kaj Zhou jam



Nigre glazurita porcelana vazo kun desegno de peonioj (1032-1227), elterigita en Ningxiang de Hunan-provinco

estas trovitaj.

La ŝlosila punkto por datado de la dinastio Xia estas difini la plej fruan Xia-kulturon. Oni jam trovis ĝiajn ruinojn, kiuj estas utilaj por fari la datadon. En la urbo Yanshi, Henan-provinco, antaŭ nelonge oni malkovris internan urbeton de Shang-dinastia urbo. Fakuloj opinias, ke ekkonstruado de la urbeto eble markas la komencon de Shang kaj pereon de Xia. Pere de datado de tiuj historiaj objektoj elterigitaj en la urbeto oni certiĝos pri la tempo, kiam Shang pereigis Xia-dinastion.

La abundaj historiaj objektoj en la ruino de Shang-dinastio donis sufiĉajn kondiĉojn por datado de la regperiodo de ĉiuj ĝiaj reĝoj, precipe la skribaĵoj sur orakolaj ostoj povas esti materialoj por korekti la antaŭajn erarojn.

Dum longa tempo oni ne scias, en kiu jaro naskiĝis Zhou-dinastio. Pri tiu problemo oni faris 44 supozojn. La plena eklipso de la suno okazinta la 9-an de marto 1997 donis grandan ĝojon al la fakuloj pri datado. Dank' al esplorado pri la rezulto de la observado, ĉinaj astronomoj fine venis



Bronza kvarpieda kuirvazo de la Okcidenta Zhou-dinastio

al la konkludo: Se vera estas la noto en antikva libro, ke en la unua jaro de la regperiodo de reĝo Ji Jian okazis suna eklipso, do per astronomia studo oni povas konstati, ke la suna eklipso okazis la 21-an de aprilo 899 a.K. Ĝuste en tiu jaro Ji Jian surtroniĝis. Pri la regperiodo de aliaj reĝoj de la Okcidenta Zhou-dinastio oni povas scii post studo de la historiaj objektoj elterigitaj en la tombo de markizo Jin (Ĝin). Se oni certiĝos pri la preciza regperiodo de markizo Jin kaj la postaj heredintoj, oni do sciiĝos pri regperiodo de ĉiuj reĝoj de la Okcidenta Zhou-dinastio.

Pri la perspektivo de datado de la tri dinastioj, prof. Li Boqian, respondeculo de tiu laboro, diris, ke katenate de la mono, tempo, tekniko kaj aliaj, oni ne povas garantii la absolutan precizecon de la datitaj jaroj, tamen ĉi-foje la ekarto estos reduktita al 20-30 jaroj. Kompare kun la 100-jara ekarto, kiun oni akiris en la pasinteco, tio estas granda progreso. Kompreneble, tio estas nur la unua paŝo de datado de la tri dinastioj kaj en la estonteco ilia laboro daŭros kaj la precizeco estos pli kaj pli granda. ■

“El Popola Ĉinio” eliras de ĉi tie

PRESKAŬ en la 20-a de ĉiu monato la Pekina Internacia Poŝta kaj Telekomunika Oficejo sendas aŭton al la redakcio de “El Popola Ĉinio” por forporti ĝiajn novajn ekzemplerojn. Ĝenerale, post traktado ili estas transportitaj al la Pekina Flughaveno aŭ haveno de Tianjin samtage. Se ili trafas samtangan flugon, iuj legantoj eble povas frue legi, dum per marŝipo ili atingas niajn legantojn tre malfrue.

La Pekina Internacia Poŝta kaj Telekomunika Oficejo estas la plej granda centro de traktado de internaciaj poŝtaĵoj en Ĉinio, preskaŭ ĉiuj poŝtaĵoj por aliaj landoj koncentriĝas ĉi tie, kaj post traktado ili estos sendataj en sakoj al pli ol 200 urboj de pli ol 100 landoj kaj regionoj. La oficejo ricevas ankaŭ poŝtajn sakojn el aliaj landoj.

Kompreneble, ankaŭ la poŝtaĵoj de la legantoj venas ĉi tien. La eksporta sekcio de la oficejo respondecas pri sendado de “El Popola Ĉinio”. Ekde sia unua numero “El Popola Ĉinio” eliras de ĉi tie. Precipe de 1994, kiam la redakcio komencis mem distribui la gazeton, la rilatoj inter ĝi kaj la oficejo estas pli intimaj.

La eksporta sekcio havas 90 laborantojn dividitajn en 3 grupojn, kiuj respondecas pri akceptado, klasifikado kaj sendado. Ĉiutage la grupo por akceptado navetas inter klientoj kaj la ofice-



EPĈ-ekzempleroj antaŭ ekspedo

jo. Kiam venas poŝtaĵoj, la aliaj du grupoj sin okupas pri klasifikado kaj sendado. Por trakti poŝtaĵojn kiel eble plej rapide, la grupo por klasifikado dividas sin en tagskipon kaj noktoskipon. La laborantoj de la tri grupoj bone kunlaboras. Ilia laboro garantias akuratan sendadon de la poŝtaĵoj. Krom amaso da poŝtaĵoj de konstantaj klientoj, la laborantoj ĉiutage traktas ankaŭ disajn poŝtaĵojn, ĝenerale 100 mil, iam eĉ 300 mil.

SCIOJ NEELĈERPEBLAJ

Plejparto de la laborantoj de la eksporta sekcio diplomiĝis de poŝta kolegio. Ili estas ĉ. 30-jaraj. Kvankam ili jam povas plenumi la laboron per siaj scioj akiritaj

en la kolegio, tamen ili opinias, ke traktado de internaciaj poŝtaĵoj estas laboro faka kaj devokonscia, kaj por eviti eraron kaj pli bone plenumi la laboron ili devas plu lerni. Tial ili ne nur lernas la anglan lingvon, diversajn sciojn pri aliaj landoj kaj manipulado de komputero kaj partoprenas konkurson pri fundamentaj scioj kaj teknikoj, sed ankaŭ studas en postlabora universitato por plenkreskuloj en libera tempo.

Tamen lernado ne estas facila. Iuj laborantoj ĵus edz(in)iĝis, aliaj havas am-aferon. Post peza laboro ili volas malstreĉiĝi. Se ili volas lerni ion, ili devas tion fari en libera tempo. Ĝenerale, por ellerni iun fakon oni bezonas

3 jarojn. Tiuj junuloj venkis la malfacilojn kaj plenumis la studadon, kaj iuj el ili eĉ estis transpostenigitaj al pli gravaj sekcioj.

Xiao Ren diplomiĝis de poŝta kolegio kaj eklaboris en la eksporta sekcio en 1991. Ĉar ŝi bone lernis en la postlabora universitato kaj bone konas la poŝtan fakon, en 1994 ŝi komencis labori en la sekcio de arkivo kaj nun respondecas pri konsultiĝo pri alilandaj poŝtoŭficejoj.

Kiam Jiang Bin diplomiĝis de poŝta kolegio antaŭ 8 jaroj, ŝi estis nur 19-jara. Ŝia hejmo estas malproksima de la oficejo. Ĉiutage ŝi bezonas 3 horojn por iri al la oficejo kaj reveni hejmen. Malgraŭ tio ŝi lernis 3 jarojn en libera tempo kaj akiris diplomon pri ekonomia administrado. Kvankam ŝi faris multe da penoj, tamen ŝi rigardis tion inda. Lernado ne nur donis al ŝi sciojn, sed ankaŭ helpas al ŝia laboro. Ŝi diris, ke post laboro ŝi preferas beligi sin mem kaj volas porti belajn vestojn, ĉar en la oficejo ŝi portas laborveston.

EN LA INTERESOJ DE KLIENTOJ

Pro evoluo de telekomunikado kaj altigo de afranko, la poŝto

havas malfacilojn. En tia situacio la eksporta sekcio daŭre multigas servojn, ekz. preni sendaĵojn ĉe klientoj, paki kaj sendi ilin anstataŭ klientoj. Kiam klientoj renkontas malfacilojn, la sekcio entuziasme helpas ilin.

Foje, iu kliento telefonis al ili, ke ĉe li estas 70 kestoj da libroj, kiujn li bezonas tuj sendi al Taiwan. Ricevinte la telefonaĵon, Li Jianguo, estro de la grupo pri pogranda sendo de poŝtaĵoj, kune kun aliaj laborantoj aŭte venis al la kliento kaj transportis la poŝtaĵojn al la oficejo. Ili reordigis la poŝtaĵojn. Por protekti la librojn kontraŭ akvo, ili kovris ilin per plasta spongo kaj metis ilin en la kestojn. Ricevinte la poŝtaĵojn, la adresato de Taiwan tre kontentis. Kiam li vizitis Pekinon, li speciale venis al la oficejo por esprimi dankon.

Alifojte Li Jianguo kaj lia kolego prenis poŝtaĵon ĉe kliento. Dum transportado pluvis. Por protekti la poŝtaĵon kontraŭ la pluvo, ili kovris la poŝtaĵon per manteloj, sed ili mem tramalsekiĝis.

Iuj poŝtaĵoj kuŝis en subtera ĉambro aŭ supra etaĝo sen lifto. Li Jianguo kaj liaj kolegoj ĉiutage transportadis eĉ po 200-300 kg

da poŝtaĵoj.

Multigo de servoj signifas intensiĝon de laboro, tamen ilia rapida kaj zorgema servo ricevis konfidon de klientoj.

ESPERANTO FAVORATA

3 estroj de la oficejo estas membroj de la societo "Amikoj de Esperanto".

Esperanto ne estas oficiala lingvo de la oficejo, tamen ili uzas Esperanton. Kial Esperanto estas tiel favorata? Kun tiu demando mi vizitis Gan Min, modelan laboranton en la oficejo.

Gan Min diris, ke la redakcio de "El Popola Ĉinio" estas multjara kliento de la oficejo. La laborantoj de la oficejo konas la historion kaj perspektivon de Esperanto. La laborantoj havas multe da ŝancoj por kontakti alilandanojn, tial ili multe spertis lingvajn malfacilojn. Jen kial Esperanto estas favorata.

Antaŭ 5 jaroj komputero eniris en la eksportan sekcion. Ĝi anstataŭis manlaboron en registrado de poŝtaĵoj. Antaŭ nelonge ili ellaboris novan sistemon, esperante, ke ĝi donos al ili pli grandan ŝanĝiĝon. ■

(Daŭrigo de p. 25)

por 10 janoj. Lastjare venis amaso da knabinoj kaj aĉetis unufoje 30 parojn da ŝuoj. Tiam la maljunulo pensis, ke estus pli bone, se li havus pli multajn helpantojn por fari ŝuojn pli belaj kaj vendi ilin en grandaj urboj. Ĉiujare studentoj el belartaj institutoj de grandaj urboj venas al Xingping por pentrado. Ili ŝatas la ĉiam malsekan Spiralo-monton kun natura spiralo; ili ŝatas ankaŭ la malnovajn domojn kun blankaj muroj kaj nigraj tegoloj plene kovritaj de musko; tamen plej ofte ili pentras ĉe la maljunu-

lo, vidante lin paŝi en lignoŝuojn kaj reen en la ĉambro. Samtempe ili kune kun li aŭskultas malnovajn kantojn. Ili rimarkis lian trankvilan vizaĝesprimon. Malnova diktafono, malnova kanto, malnov-tipaj lignoŝuoj konsistigas la tuton de lia maljuneco. Tamen li kontentas pri tio: "Se mi ne havos energion fari ŝuojn, mi servos kiel barbiero." Tio kortuŝis la junulojn. Ili sentis, ke la humoro de la maljunulo estas trankvila kiel Lijiang-rivero. Kiam ili faris pentraĵon, multe trankviliĝis ankaŭ ilia humoro. ■

Paco-kompanio servas al vi

La Paco-kompanio (Ĉinio) por konsultiĝo pri internacia afero
Servas al investantoj, turistoj kaj fakuloj:

Importo kaj eksporto de komercaĵoj;

Laboro en Ĉinio; internacia geedziĝo.

Adr.: Direktoro Ling Bo, P.O. Box 2, CN-230001, Hefei, Ĉinio.

Tel/Fax: +86-551-2632545; -4484606

Hejmpaĝo:

<http://www.online.ah.cn/pac/>

Ret-poŝto:

cnhflib@public.hf.ah.cn

Sanprotekto en aŭtuno

EN frua aŭtuno la somera varmo ankoraŭ ne cedas al ĝi kaj oni daŭre sentas netolereblan varmon, pro tio la ĉinoj nomas tian varmon "aŭtuna tigro". En meza aŭtuno la klimato estas agrabla kaj en profunda aŭtuno pro ventado kaj pluvado oni sentas malvarmon.

Aŭtune la aero estas seka. Tage varmas kaj nokte malvarmas. Tiam oni estas facile atakita de akuta seka gripo.

Ĝiaj suferantoj estas turmentataj ne nur de la simptomoj de ordinara malvarmumo, sed ankaŭ de malagrabla sekeco de la gorĝo, naztruo kaj lipoj, tusado, febro, kapdoloro ktp. La malsano similas al infektiĝo en la supra spira kanalo kaj akuta bronkito.

Laŭ la ĉin-medicina teorio oni opinias, ke aŭtune sekaj kaj varmaj patogenaj faktoroj sin trudas en la homajn pulmojn kaj kaŭzas malsanon. Komence, la malsano estas ne grava. Se oni kuracas ĝin frue, do la malsanuloj facile resaniĝos. Neĝustatempa kaj neĝusta kuracado ofte gravigas la malsanon. Sekve de tio, la patogenaj faktoroj sin trudas en intestojn kaj kaŭzas intestan gripon kaj mallakson. Se la malsano pligraviĝas, ĝi do atakas la hepaton kaj renojn kaj kaŭzas gravan febron, konvulsion, hemoragion kaj aliajn. La ĉin-medicinaj kuracistoj dividas la sekan gripon en la varmetan kaj malvarmetan. Ili opinias, ke en profunda aŭtuno estas malvarmete kaj blovas malvarma vento, oni facile suferas de malvarmeta gripo, pli milda ol tiu en frosta vintro. En la suna tago oni facile suferas de varmeta gripo, pli grava ol tiu en malfrua printempo, tial la malsano strikte rilatas al ŝanĝiĝo de la klimato.

Por preventi la varmetan kaj malvarmetan gripojn oni devas fari la jenon:

Aŭtune la vitala energio *jang* en la naturo tendencas al moderiĝo kaj tiam oni devas en- kaj ellitiĝi frue por retiri la vitalan energion *jin* kaj eltiri la

vitalan energion *jang*. Samtempe oni devas reguligi la humidecon en la ĉambro. La homoj, kies haŭto estas seka kaj kruda, devas malofte sin bani, sed ofte ŝmiri sin per glicerino kaj aliaj haŭtoprotektaj kremo.

En aŭtuno oni devas sufiĉe atenti pri sia nutrado, ĉar en somero oni multe trinkas kaj malmulte manĝas. Aŭtune abundas legomoj kaj fruktoj. Tiam, se oni manĝas pli da ili, tio tre utilas por forigi la sekecon de la okuloj, naztruo kaj gorĝo, krudecon de la haŭto, mallakson kaj aliajn malsanojn. Tiuj, kiuj suferas de la stomaka kaj liena debileco, devas preni la manĝaĵojn kuiritajn anstataŭ krudaj kaj malvarmaj. Oni povas kuiri pirojn kaj manĝi la piran supon. Tio estas tre utila por kuraci sekan gripon kaj sekan tusadon.

Aŭtune oni devas atenti la diversecon de nutraĵoj kaj preni pli da acidaj manĝaĵoj kaj malpli da akraj kaj oleozaj por humidigi la pulmojn. Tiam oni povas preni pli da bovlakto, sojfabo lakto, karotoj, tomatoj, piroj, persimonoj, blankaj orelfungoj k.a. kaj malpli da akraj, frititaj kaj rostitaj manĝaĵoj, kiuj kaŭzas pirozon, lipan kaj gorĝan sekecon kaj afton.

En frua aŭtuno oni devas toleri malvarmon kaj eĉ en profunda aŭtuno oni ne devas sin vesti tro dike. Kvankam en aŭtuno la temperaturo iom post iom malleviĝas, preferindas porti kompare maldikajn vestojn por levi la rezistpovon kontraŭ malvarmo. Se oni tion faras, do en malvarma vintro oni povas efike rezisti kontraŭ malvarmo. Kompreneble, tio devas esti konforma al ŝanĝiĝo de la klimato, kondiĉe ke oni ne malvarmumiĝos.


Ja estas vere, ke la plej taŭga rimedo kontraŭ malsanoj estas fizika ekzercado. Aŭtune, en la hela tago oni povas fari montogrimpado, kuradon, naĝon ktp, kio estas utila al la sano de la pulmoj, pligrandigo de la rezistpovo de la organismo kontraŭ seka gripo. ■

Bambua plektaĵo

Arkeologia esploro montras, ke jam en neolitiko ĉinoj ekfaris bambuajn plektaĵojn.

Por fari plektaĵojn la metiartistoj tranĉas la bambuon, poluras kaj fadenigas bambuajn pecojn. Utiligante verdan kaj flavan kolorojn de la bambuo, ili plektas diversajn bildojn. Ili gravuras, brulmarkas, orumas aŭ lakas la plektaĵojn. Estas diversaj bambuaj plektaĵoj, kiaj tablo, seĝo, ŝranko, lito, ŝirmilo, botelo, telero, skatolo, birdoj kaj bestoj.

La bambua plektaĵo ĉi-apude estas farita de la Artaĵ-kompanio de Zhejiang-provinco.





Rememoro
de **STANKOVIC**
NEBOJŠA
(Jugoslavio)



Aŭstria pejzaĝo
de **HANS**
FECHLER
(Germanio)

ISSN 0032-4361

